

KRILOV

111

fabloj



Ivan Andrejevich Krilov

111 Fabloj

Содержание

Krilov 111 FABLOJ Hungara Esperanto-Asocio Budapest 1979	0008
LIBELO KAJ FORMIKO	0012
PASANTOJ KAJ HUNDOJ	0014
RANO KAJ BOVO	0015
KUIRISTO KAJ KATO	0016
FISH-SUPO DE DAMIENO	0018
DU HUNDOJ	0020
RABISTO KAJ KAMPULO	0023
STURNO	0025
PORKO SUB KVERKO	0027
SCIVOLULO	0029
LUPO KAJ SHAFIDO	0030
SPEGULO KAJ SIMIO	0033
SIMIO KAJ OKULVITROJ	0034
LUPO KAJ GRUO	0035
NAJTINGALO KAJ AZENO	0036
MUSO KAJ RATO	0038
FRINGELO KAJ KOLOMBO	0039
DU BARELOJ	0040
ANSEROJ	0041
KORNIKO KAJ VULPO	0043
PORKO	0045
ELEFANTO KAJ MOPSO	0047
KVARTETO	0048

KOKO KAJ PERLO	0050
CIGNO, EZOKO KAJ KANKRO	0051
KORNIKO	0052
SERPENTO KAJ SHAFO	0054
KAFTANO DE TRISHKO	0055
LUPO KAJ PASHTISTOJ	0056
IDOLO	0057
MENSOGULO	0059
KATO KAJ EZOKO	0062
AKVOFALO KAJ RIVERETO	0064
MUZIKISTOJ	0065
GRANDSINJORO	0066
LUPO EN HUNDEJO	0068
VULPO KAJ VINBEROJ	0070
DU KNABOJ	0071
TRIOBLA EDZO	0073
SKATOLO	0075
LEPORO DUM CHASO	0077
DANCO DE FISHOJ	0078
EZOKO	0080
POPOL-KUNVENO	0082
LEONO DUM CHASO	0083
KAMPULO KAJ SERPENTO	0084
KOKO KAJ KUKOLO	0085
SCIURO	0087
URSO LABOREMA	0089
LEONO KAJ VULPO	0090
SHTONO KAJ VERMO	0091

DRAKO	0093
BUNTAJ SHAFOJ	0094
MIRONO	0096
KAMPULO KAJ KAMP-LABORISTO	0098
CHEVAL-TRAJNO	0100
DIVIDO	0102
KUKOLO KAJ AGLO	0104
KAMPULO KAJ SHAFO	0105
SIMIO	0107
NAJTINGALO KAJ KATO	0109
KAMPARANO EN MALFELICHO	0111
KORNIKO KAJ KOKINO	0113
MALSHPARULO KAJ HIRUNDO	0115
MUELISTO	0117
OMBRO KAJ HOMO	0119
MUSHO KAJ VOJAGHANTOJ	0120
MUSHO KAJ ABELO	0123
PARUO	0125
FORMIKO	0127
KOMERCISTO	0129
DU KAMPULOJ	0130
FOLIOJ KAJ RADIKOJ	0132
LUPO KAJ VULPO	0134
LUPO KAJ KATO	0136
LUPO KAJ MUSIDO	0138
PASHTISTO	0140
ELEFANTO-CHEFULO	0141
TRI KAMPULOJ	0143

FLOROJ	0145
LUPOJ KAJ SHAFOJ	0147
AVARULO	0149
PASHTISTO KAJ KULO	0151
POTO KAJ KALDRONO	0152
ENTERIGO	0154
VULPO KAJ AZENO	0156
KALUMNIULO KAJ SERPENTO	0158
AGLO KAJ KOKINOJ	0160
BALAILO	0162
PARNASO	0163
RAZILO	0165
MUSOJ	0167
SCIURO	0169
FESTENO	0171
KAMPARANO KAJ RABISTO	0173
HUNDO KAJ CHEVALO	0174
VULPO	0175
LEONO KAJ MUSO	0177
FALKO KAJ VERMO	0179
KAMPARANO KAJ VULPO	0180
LEGOMISTO KAJ FILOZOFO	0183
BUBO KAJ VERMO	0186
MALRICHA RICHULO	0189
HUNDO KAJ KAMPULO	0193
AZENO KAJ KAMPULO	0195
PAROHHANO	0197
DUKATO	0199

KAMPARANO KAJ SERPENTO0201
STURNO KAJ KATIDO0202
NUBO0204
HERAKLO0205
PRI LA ESPERANTA TRADUKO DE LA KRILOVAJ FABLOJ (Kelkaj rimarkoj de la tradukinto)0207

Krilov

111 FABLOJ

Hungara Esperanto-Asocio

Budapest

1979

La elstara, eminenta rusa verkisto Ivan Andrejevich Krilov (1769–1844), komence verkinto de komedioj kaj publicisto, vere glorighis en la 19-a jarcento kiel genia fablisto, kreinto de multaj mirindaj fabloj.

En tiuj fabloj spegulighis la profunda sagho kaj spri-teco de la aŭtoro, kiu tute reale kaj vigle transdonis en versaj rakontoj la multflankan vivon de sia epoko.

La temo de kelkaj fabloj estis prenita el versoj de gloraj antaŭuloj (Ezopo, Fedro, Lafonteno), sed la plej granda parto de liaj fabloj estis tute originala, kaj ili chiu, chu adaptitaj, chu originalaj, estis verkitaj libere, en siaspeca, memstara stilo, en bonega bel-sona lingvo, richa je popolaj parolturnoj.

Krilov agis kiel granda satiristo: li akre prijuĝhis ne-gativajn flankojn de la homaj moroj

kaj de sociaj rilatoj de la epoko, en kiu li vivis. La majstra ironio kaj sagha prudento de Krilov aperas tre koncize kaj trafe: pluraj esprimoj el liaj fabloj baldau farighis popolaj proverboj, kiuj perfekta kaj sprite ludas sian rolon en la chiutaga parolo ghis nun. Jen, kelkaj tiaj ekzemploj:

*Plej fortas Mopso, sen demand', - Ghi
bojas kontrau Elefant',
Okulo ja pretendas, sed
malproksimas dent',
Al fremda malfelich' ne moku kun
facil',
La elefanton mi tutplene ne atentis,
Post bojo eksilentas ili, Amiko-
malsaghul' dangheras per kares',
Sed sur la sama lok' ghis nun
senmovas char',
Malpravas senfortul' konstante en la
mond'*

Krilov sarkasme kaj indigne priskribis la senmoralighon de la nobelaro, ghian rabistan ekspluatadon al la sendefenda popolo, la korupton, maljuston, socian neegalecon. Krilov senkompate vipis la malkleron kaf stulton, flatemon kaj mensogon, fanfaronon kaj vantecon, senzorgon, kalumnion, egoismon, sendankon,

envion, avidecon ktp.

En siaj fabloj Krilov estis efektive demokrata — li sincere kaj senkompromise simpatiis por simplaj, ordinaraj homoj el la popolo, por ilia modesta kaj utila laborado.

La rusa verkisto (kaj ankaŭ konata esperantisto) I. V. Sergejev, aŭtoro de libro pri Krilov, skribis jene:

"Neordinare simpla kaj tre richa lingvo, klareco kaj profundo de pensoj proksimigis la verkojn de Kri-lov al la popolo. La tute reala, laŭvera priskribo elvokis en la legantoj sinceran amon kaj estimon al li. Sed plej forte altiris la legantojn la tutkora optimismo, la forta konvinko pri la estonta certa triumfo de justeco, — la konvinko, kiu estis propra al la popolo mem. Krilov he lamentas pri la sorto de malrichuloj, ne verŝas maldolchajn larmojn, sed li ruze kaj malshate ridetas kontraŭ konkreta malamiko, li moke atakas' lin kaj per kolera ironio li dispremas la forton de la kontraŭulo kaj la timon antaŭ ties forto. Jen en tiu optimisma, vivoplena realeco sin kashas la magia forto de la poeto kaj la sekreto pri la senmorteco de liaj verkoj... Li estis ne ordinara instrua moralisto, sed li agis kiel

severa akuzanto, senkompromisa, nekoruptebla, kiel la konscienco mem de la popolo."

Lau eldiro de la rusa verkisto. N. Tihhonov, la fabloj de Krilov ne maljunighas, ĉar la vortoj, kiuj esprimas veron, ne povas maljunighi.

Efektive, la fabloj de Krilov restis ghis nun vere popularaj, kaj ili eniris la oran fonduson de la tutmonda klasika literaturo.

S.Rublov

LIBELO KAJ FORMIKO

*La Libelo-flirtulin'
Kantis gaje en somero,
Sed subite sur la tero
Al somer' alvenis fin'.
Tute mortis kampo greno,
Jam forestas tag' serena,
Kiam en folia verd'
Estis mangho kaj desert'.
Chio pasis; kun malvarmo
Venas tempo por mizer',
Mankas kantoj de somer';
Chu konvenas dum sufer'
Gaja kanto kiel garno?
Kun sopiro kaj chagren'
Al Formik' ghi rampas jen.
"Ne forlasu min, amiko,
Donu helpon kun efiko, —
Ghis printemp' kaj suna bril'
Ne rifuzu pri azil'."
"Amikin', ghi strangas vere,
Chu laboris vi somere?"
Shin demandas la Formik'.
"Chu mi eblon tiun havis?
En la herba milda mol'
Gaja kanto kun petol',
Kun amuz' nin plene ravis!"*

*"Ha, vi estis..." — ,Dum somero
Mi kantadis kun pasi'."
"Do vi kantis? — Bon-afero:
Nun ekdancu kun graci'!»*

PASANTOJ KAJ HUNDOJ

*Amikoj du promenis en vesper'
Kaj traktis ili grave pri afer'.
Subite jen el subpordega loko
Al ili Hund' ekbojis kun minac',
Kaj poste du au tri ripetis en audac',
Kaj baldau preskau cent' alkuris je
provoko.
Intencis jam Pasant' defendi sin per
shton',
Sed la alia tuj rimarkis kun rezon':
"La bojo de Hundar' pro tio ja ne
chesos,
Pro via shtona frap' la Hundoj nur
ekscesos.
Ni iru simple for kaj ili ne agresos."
Kaj fakte post nelonga voj',
Plimalfortighis hunda boj'
Kaj eksilentis ghi per unu foj'.*

*La enviuloj povas tre simili,
Jen ili bojas kun impet',
Sed pasu vi trankvile, en kviet':
Post bojo eksilentos ili.*

RANO KAJ BOVO

*Al korpulenta Bov' la Ran' komparis
sin*

*Kaj pri dikec' konkuri ekdeziris:
Envio regis ghin.*

*Shveligis sin la Ran', pufighis kaj
blovspiris.*

*"Kvakulo, diru nun, chu estas jam
egal'?"*

*Al Ran' sin turnis ghi — "Neniom en
real'!»*

*"Jen vidu, kiel mi blovighos por
konkur'!*

Vi diru nur,

*Chu jam dikighis mi?" — "Ne larghas
la figur'."*

*"Kaj kiel estas nun?" — "Aspekt' en
sama stato."*

*Pufighis Rano plu per la fervora blov',
Sed ne atingis ghi dikecon de la Bov',
Kaj estis pro shveligh' nur kрева
rezultato.*

Al nia viv' similas la satir':

Mizera burgh' pretendas kun aspir',

Imiti plene al bonhava vir',

Kaj eta oficist' — al nobla kavalir'.

KUIRISTO KAJ KATO

*Jen digna Kuirist', la majstro de la art',
Drinkejon venis laŭ hazard'
/Li en pieco gardis akuraton,
Funebri li en tiu tag' bofraton/,
Kaj por la kontraŭmusa gard'
Restigis li la Kato.
Sed kion vidas li post ia reven'?'
De kuk' restajhon; kaj la Kato mem
Sidante ĉe barelo kun aĉeto
Formanĝas en murmur' kokidon en
kvieto.
"Vi, manghegulo, kaj krimul'!"
La Kuirist' riproĉas kun malŝato:
"Ĉu vin ne frapas honto kvazau
brul'?"
/Kaj dume machas la kokidon Kato/.
Honeste Kato estis vi ĝhis nun,
Ekzemplo estis vi ĝhis nun,
Kaj jen... Ho, kia estas maifortun'!
Pri vi najbaroj diros kun atesto:
Fripono estas Kat', ŝtelisto kaj
pirat'!
De la rostajhoj kaj de supo
Ni pelu lin el korto sen kompat',
Ja kvazau estus li malnobla lupō.*

Li estas pest', ulcero estas Kat'! "
*/Auskultas tion Kato dum manghad'/.
La Kuiristo estis oratoro,
Edifis li abunde kun fervoro,
Kaj dum ripetis li patose sin
Formanghis Kat' kokidon ghis' la fin'.*

*Konsilus mi al kuiristo ajna
Surmure noti por efik':
Ne babilachu kun minaco shajna
En kazo de potenc-aplik'.*

FISH-SUPO DE DAMIENO

*"Najbaro mia! Kara kamarad!
Vi manghu supon! Petas mi,
bonvolu."*

"Mi estas tute sata de manghad'."

*"Ho, ne! Ankorau tason, ne parolu!
La sup' bongustas, provu ghin! "*

*"Tri tasojn manghis mi." — "Nu kial
la kalkulo?"*

*Ankorau manghu vi, karulo,
Por sanefiko ghis la fin'!*

*Bonegas fisha sup'! Kaj estas ghi kun
gras':*

*Ja kvazau de sukcen' flavetas tiu tas'.
Konsolu min, mi petas vin kun amo!*

Jen tripoj, jen sterled', jen bramo.

Ekprovu vi ancorau de la vaz'!»

Regalis tiel Damien' najbaron

*Kaj laudis li sen ches' miraklon
kulinaran.*

*Kaj la najbar' plenshvitastis pro gastig',
Sed tamen prenas li ancorau unu
tason,*

*Kun lasta strecha fort' la supon
grasan*

*Altrude glutas li. - "Jen estas vi
amik'!"*

*La mastro diras: "Tute sen fiero!
Nu manghu vi ankoraŭ por
prospero!"
Sed malgrau bongustajh' jam krevis
la toler':
La malfelicha gast' en plena
malesper'
Kaptinte la bastonon,
La chapon kaj la zonon,
Al sia hejmo rapidis sen prokrast'
Kaj plu al Damien' ne venis kiel gast'.*

*Verkist', felichas vi pri via verk-
talento,
Sed estu en okaz' modesta kaj silenta,
Ne tro abundu vi en deklamad'
turmenta,
Ĉar povas via verk' farighi abomen'
Kaj tedos kiel sup' de majstro
Damien'.*

DU HUNDOJ

*La simpla korta hund', Barbos lau
nom',*

*Gardisto kun fervor' de la sinjora
dom',*

Rigardis foje la fenestran breton

Kaj vidis li Jhujhu'-hundeton

*Kushantan sur kusen' kun placha
delikat'.*

*Char estis li amik', malnova
kamarad',*

*Barboso-hund' tre ghojas kaj
ekzaltas,*

*Al la fenestra bret' alvenas kun
kares',*

*Kun vigla vosta sving' ghemetas li
sen ches',*

Kaj gaje saltas.

*"Nu, kiel vi, Jhujhu', felichas en
fortun',*

*Post kiam la sinjor' vin prenis kaj
kompatis?*

*Ja iam en la kort' ni ofte tre malsatis,
Kaj kiel al sinjor' vi servas nun?"*

*"Ne plendas mi pri sort' ", hundet'
Jhujhu' eldiras:*

"Sinjoro kun ador' min shatas kaj

admiras.

Mi vivas en felich'

En ghuo kaj en rich',

Amuzas en divers', kaj por ripoz'

bonvola

Libere kushas mi sur la tapisho mola.

Kaj kiel vi?" — "Mi," diris hund'

Barbos'

Kun vido de malghoj' kaj mallevita

vost':

"Mi vivas lau malnov'; suferas pro

malsato

Kaj pro malvarma stato.

La domon de sinjor' mi gardas kun

fidel',

Dum pluvo kaj dum negh' estante sub

chiel'.

Kaj se en bojo mi eraras,

Por mi punbato ordinaras.

Sed kiel vi, Jhujhu', alvenis al felich'?

Malforta estas vi, statur' en

malsufich'...

Ja, malgrau mia fort', mi penas sen

rezulto.

Sed kiel via serv'?" — "La serv'? Ne

estas multo,"

Jhujhu' respondis kun malshat':

"Sur du piedoj marsh-irad'."

*Tre multaj en la viv' felichon sian
trovas,
Char sur piedoj du marshadi ili
povas.*

RABISTO KAJ KAMPULO

*En arbustaro densa, dum vespero,
Embuskis kun minac' Rabist',
Kaj kiel urso en severo
Atendis li viktimon kun persist'.
Kampulo venis jam kun sia granda
charo.
"Jen estas por foir', verŝajne,
varo, —
La ŝtofo luksa, drapo por admir'.
Atakos mi, — kaj fruktos bon-akir'.
Ne vane mi atendis en arbaro."
Rabisto en subit' ekkriis laute:;Halt'!"
Kaj al Kampul' sin jhetis kun bastono;
Sed ne sukcesis li en sia salt'.
Responde la Kampul' rebatis al
fripono;
Ghi estis por Rabist' tre forta leciono;
Kampulo kun ekzalt'
Batale sin defendis.
Reziston de Kampul' Rabisto ne
atendis.
Okazis interbat' kruela kun dolor'.
Dek dentojn la Rabist' suferis en
batalo,
Rompita tute brak'; okulo estis for.
Sed venkis la krimul' en la atak'*

*fatala,
Mortigis li Kampulon sen kompat'.
Sed kion gajnis li en tiu interbat'?
Vezikojn en abund', - jen estis
rezultat'.*

*Tre oftas en la viv' — pro simpla
bagatelo
Okazas krimoj nur, — sovaghaj kaj
sen celo.*

STURNO

*Por chiu hom' ekzistas la talent'.
Sed ofte volas homo kun pretend'
Aferon iun fari nur,
Al kiu mankas ech kapablo.
Ne spitu vi al legho de natur':
Laboros vi sukcese, kun agrablo,
Nur agu sen pretend', lau via propra
fort'.*

*Jen iu Sturn' imitis en akord'
Al kanto de kardel' tre bone, kun
fidelo,
Ja kvazau mem li estus la kardelo.
Per sia gaja voch' li kantis en arbar'
Kaj chiu laudis lin pro tiu kanta far'.
Sed ne limigis sin la Sturno en
talento, —
La fam' pri najtingal' atingis jam al li,
Turmentas Sturnon nun envia sento.
Li pensas: „Kantos mi
En bela melodi',
Lau najtingala sono."
Kaj fakte pro envi'
Li kantas en arbar' lau nova kant-
fasono.
Jen pepas li, jen estas rauka kri',*

*Jen blekas kiel hund' maisata,
Jen en subit'
Miauas kvazau kato.
Disflugis birdoj for pro tiu kant-
ekscit'.
Amiko mia Sturn', plibonas lau merit'
Kardela simpla kant' en tono
delikata,
Ol kant' de najtingal' en bleka fush-
imit'.*

PORKO SUB KVERKO

*La Porko sub la Kverk-kolos'
Per glanoj en abund' regalon bonan
havis,
Kaj poste sub la kverk' ekdormis por
ripoz'.
Post dormo kaj vekigh' la Porko tute
bravis
Kaj grundon che radik' per la muzelo
kavis.
"Por arb' ghi estas malutil'",
La korvo diras lau konsil':
"Se nudos la radik', sekigho sekvos
plena".
"Sekighu ghi", ekgruntas Pork' sur
ter';
"Por mi la kverka sort' ne estas ja
chagrena.
Chu vivos kverk' au ne, ne gravas la
afer',
Al mia bona stat' ne povas ghi utili.
Ekzistu glanoj nur, grasighas mi per
ili".
Al Pork' respondas Kverk': "Sendanka
estas vi!
Se povos vi muzelon supren teni,
Kapablus vi kompreni,*

Ke kreskas chiu glan' sur mi".

*Per sia blind' similas sensciulo:
Por li scienco estas nulo,
Ignoras li pri studo kaj esplor'
Sed manghas fruktojn de scienc-
labor'!*

SCIVOLULO

*Saluton, kamarad'! De kie venas vi?"
"Mi estis en muze', en Urba Galeri',
Kaj chion por rigard' mi vidis en
detalo.*

*Pri tuta valorajh' en chiu halo,
Rakonti ech ne povus mi.*

*Jen mirindajh' ghuiga por plezuro!
Mirakla estas verk' donita de naturo!
Impreson havis mi de chiu animal'!
Kaj kia diversajh' — jen kraboj,
Mushetoj, kuloj kaj skaraboj,
Similaj al smerald', aliuj — al koral'!
Kaj nur imagu vi pri eta kokcinelo, —
Mezur' — je pingla kap', ekstero —
lau juvelo!"*

*"Kaj kiel elefant' aspektas en la hal'?"
Ghi kvazau mont' vershajne sin
prezentis?"*

*"Chu tie estis ghi?" — "Nu certe", —
"En real'*

La elefanton mi tutplene ne atentis."

LUPO KAJ SHAFIDO

Malpravas senfortul' konstante en la mond':

La historio ja ekzemplojn multajn donas,

Sed historion mi ne verkas, nek komponas,

Kaj jen pri la afer' de fablo vers-rakont'.

Shafid' en varma tag' al rivereto venis,

Sed en la sama lok' malsata Lup' sin trenis.

Manghajhon serchis li kun sanga avidec'.

Veninte al viktim' indignon li mienis, Kun la aspekt' de just' kaj legha dec';

"Chu rajtas vi, fripon', per la muzel' malpura

Trinkajhon mian leki en river'

Kun senmoder'

Kaj malpurigi ghin per ago aventura?

Pro tia malhonesta rab' Vi restos sen la kap'."

"Se Granda Lupa mosht' permesos,

Mi diros en humil', ke trinkas mi kun

paco

De lia moshta lok' je granda interspaco,

Kaj vane li insultas kaj ekscesas:

Ne povas kauzi mi malbonon nun por li."

"Do primensogas mi!

Kanajlo, sentaugul'! jen kia acha faro!

Memoras mi, ke en pasinta jaro

Arogis vi tutsame sen ghentil':

Mi ne forgesos tion kun facil'!"

"Pardonu, tamen mi ech tiam ne ekzistis."

"Do estis via frat', al vi similas li."

"Ne havas fratojn mi." — "El via famili'

Ja estis iu ajn", indigne li insistis:

"Ja tuta via gent', pashtistoj kaj hundar'

En la koler' al mi sendube tre similas

Kaj ofte lau eblec' malice malutilas.

Al vi nun estas vengh' por tuta acha far."

"Chu kulpas tion mi? " — "Silentu!»

Lupo diras:

"Min tedis la diskut', lacighis jam orel'.

Plenkulpa estas vi, ĉar manghi mi deziras."

Kaj Shafon trenis for la Lupo en kruel'.

SPEGULO KAJ SIMIO

*Ekvidis sin Simio en spegul', —
Kaj Urson petas ghi rimarki per
okul':
"Jen kia eksterajh', karul'!
Vizagho tiu estas abomeno!
Ridindas chiu mov', malsaghas la
grimac'!
Ho, mi pendigus min, se estus la
minac',
Ke mi similu ghin ech iom per mieno.
Sed mi malkashas en konfes',
Ke grimaculojn tiujn kvin au ses
Inter simioj mi kalkulos kun sukces'."
"Chu decas pri aliu la indiko?
Prefere ekrigardu vin, amiko!»
Respondis Urs' kun ironi'.
Sed vortoj de konsil' malgravis por
Simi'.
Simila fakt' por mi ne estas miro:
Ne shatas iu-ajn sin vidi en satiro.
Jen efektiv' kaj ne karikatur':
Ke Klim' shtelemas — chiu homo
vochas,
Al Klimo pri korupto ni riprochas,
Sed Klim' per kasha mov' al Petro
montras nur.*

SIMIO KAJ OKULVITROJ

*Simio en maljun' malbone tute vidis,
Sed homa fam' al ghi konfidis,
Ke tiu malbonajh' ne estas ja
dangher'
Char okulvitroj savas de sufer'.
Do vitrojn en abund' akiri ghi decidis,
Ghi turnas ilin por aplik':
Jen premas al la vert', jen sur la
voston metas,
Jen flaras kun singard', per lango jen
leketas,
Sed en rezult' — nur nulo por efik':
"Fiajho kia! Estas granda stult'
Al homoj kredi en auskult'.
Pri vitroj onidir' ja nur mensogo
estis,
Kaj mankas la util' en tiu-chi afer'".
Dirinte la Simi' chagrenon manifestis,
La vitrojn jhetis ghi al shtono en
koler'
Kaj post frakas' nenio restis.
Por homa gent' ghi estas la spegul':
Jen bona ajh' ekshajnas kiel nul'
Kaj ignorant' pri utilec' diskutas,
Kaj se li estas altrangul', Do li ech
persekutas.*

LUPO KAJ GRUO

*La lupo estas best' avida:
Ghi ne flankigas ostojn per la dent'
Dum mangh' rapida
Kaj jen al unu lup' okazis akcident'
De ost' misgluta estis ghi viktimo.
Ne eblas nun por Lupo spir' au ghem',
Kaj kaptas ghin la antaumorta trem'!
Feliche Gruo estis en proksimo;
Per gestoj Lup' klarigis pri dolor'
Kaj petis helpo en sufera hor'.
En lupan faukon Grao bekon shovis
Kaj post grandega pen' eltiri oston
povis.
Jen petas li premion por labor'.
"Vi mokas min! " ekkrias best' insida:
"Chu indas vi? Sendanka kaj perfida!
Chu vi ne devas danki kun respekt',
Ke via stulta kap' ja restis sen difekt'?
Forighu tuj! Liberon vi profitu
Kaj gardu vin, amik': estonte min
evitu!»*

NAJTINGALO KAJ AZENO

*Azen' sin turnis kun parol'
Al Najtingal': "Auskultu min amiko!
Lau famo en kantad' vi majstras kun
efiko.*

*Dezirus mi pri via rol'
Mem jughi dum vi kantos ion.
Chu bone majstras vi kantad-
metion?"*

*Responde Najtingal' ekkantis por
admir':*

*Li klakis, fajfis kun inspir'
En plej diversa form', jen en trilado
dronis,*

*Jen mildis li en la sopir'
Kaj kiel placha shalm' malgaje
unutonis,
Jen per vibranta trem' subite li
resonis*

*Ekregis nun atent'
Por la kantist' amata de l'Auroro.
Ekchesis la zefir', de birdoj gaja
horo,
Kaj kushis grego en silent'.
Pashtisto kun admir' auskulti chion
pretis
Kaj nur por la moment'*

*Dum najtingala kant' al pashtistin'
ridetis.*

Jen finis la kantist'. Azen' pri opini'

Deklaris: "Vere, vi ne vantas

Kaj certe sen enuo kantas.

Sed tamen tre bedaŭras mi,

Ke nian kokon ne ekkonis vi.

Vi multe en kantad' profitus,

Se nian kokon plen-imitus".

*La malfelicha bird', post tiu jugh-
deklar',*

*Forflugis en rapid' trans montoj kaj
kampar'.*

Plensavu, Dio, nin de tia jughantar'.

MUSO KAJ RATO

*"Amik', chu audis vi pri bona fam'?"
La Mus' alkure laute diris:
"Al ungoj de leon' la kato trafis jam!
Jen fine por ripoz' liberon ni akiris! "
"Ne ghoju, mia frat'!»
Al Mus' respondis Rat':
"Kaj ne esperu absolute.
Se komencighos interbat',
Pereos la leono tute:
Plej forta besto estas kat'!»*

*Multfoje vidis mi, kaj tion mi
konfesas:
Timulo timas iun ajn
Kaj kredas, ke timata shajn'
La tutan mondon jam impresas.*

FRINGELO KAJ KOLOMBO

*Kaptilon, pro hazard', ektrafis la
fringel'.
La malfelicha bird' baraktis kaj
batalis,
Sed la Kolomb-junul' nur mokis kaj
moralis:
"Jen kia hont'! Dum hela tag'
Kaptilon vi enfalis!
Ne trompus min hazarde tiu ag',
Mi tion garantias ghuste."
Sed jen Kolombo mem baraktas en
kaptil'.
Do juste!
Al fremda malfelich' ne moku kun
facil'!*

DU BARELOJ

*Veturis la Barel' kun vin',
En la alia —
Enhav' nenia.
La vin-barel' sen bru' kaj ne urghante
sin,
Veturis,
Sed en galop' alia kuris.
Pro ghi sur la pavim' — tondrego kaj
frapad',
Kaj polvo en kaskad'.
Pasanto en konfuz' al flanko sin
sekuris,
Audinte bruon en la strat',
Sed malgrau bruo de Barel'
Utilo ghia estis bagatel'.*

*Reklamas sin vantulo sen modero,
Sed tre modestas li en la afero.
La granda hom' modestas en parol'
Kaj grandas en aferoj por popol'.
Laboras li persiste, en trankvilo
Kaj sen babilo.*

ANSEROJ

*Per longa vergo kamparan'
Anseran gregon en la urbon pelis
Kaj per la verg' sufiche li kruelis,
Ne tro ghentilis li per sia man':
Rapidis li al la foira tag'.
Kaj se afer' koncernas la profiton,
Ne nur anserojn, ech la hom-meriton
Ne tro respektas ni en nia ag'.
Sed la Anserojn malghentil' ofendis
Kaj al pasanto iu sur la voj'
Pri kamparana krudo ili plendis:
"Jen estas ni mizeraj, en malghoj',
Nin pelas Kamparan' perforte, kun
turmento,
Ja kvazau estas ni ansera simpla
gento,
Sed ne komprenas li, malsagha stulta
hom',
Ke devas li respekti nin humile,
Ke nia nobla gent' devenas ja el Rom',
Savita de Anseroj tiom brile:
Ghis nun en Rom' anserojn oni
festas!"
"En kiu tamen fakt' merito via estas?"
"Sed nia praular'..." — "Mi tion bone
konas,*

*Pri tio legis mi, sed scii mi bezonas,
Per kia utilec' persone vi ekgravis?"
"Sed nia praular' sukcese Romon
savis!"
"Kaj kia bona ag' distingas vin
persone?"
"Nenia ag'. " — "Sed kia do valor'?"
Mencias vi praulojn senbezone:
Por ili restu la honor',
Kaj taugas vi nur por rostajh'
plejbone."
Pri traktus mi aferon lau merit'
Sed timas pri anser-incit'.*

KORNIKO KAJ VULPO

*Multfoje oni diras kun logiko
Pri malutil' de flat' kaj tamen sen
sukces',
Char flato al la kor' penetras per
kares'.
Peceton da fromagh' ekhavis la
Korniko.
Jen sur abio, sur la branch',
Korniko-nigrulin' intencis per la
mangh'
Regali sin, sed dume shi meditis.
Hazarde ruza Vulp' proksime
preterglitis;
Aromo de fromagh' impresas al la
Vulp':
Alvenas arbon li kun vido de
senkulp';
Ravita de vidajh' la Vulpo voston
svingas,
Fromaghon en la bek' agrable li
distingas
Kaj diras dolche li kun intermita
spir':
"Ho, mia karulin'! Belega por admir'!
Mirindas via kol'! Okula bril' —
juvelo!*

*Gracia estas vi, simila al fabelo!
Kaj kia plum-ornam'! Kaj kia charma
bush!
Kaj certe via voch' plenravas en
kortush'!
Ekkantu, karulin'! Se majstrus vi,
fratino,
Kantadon, kiei vi belegas lau destino,
Vi estus en arbar' reghino!"
La kapo de Kornik' turnighis pro
laudeg',
Pro ghojo en la Brust' ekchesis tute
spiro,
Kaj al ghentila vort' de vulpa flata
diro
Ekgrakis la Kornik' kun malfermita
bek',
Fromagho falis for, al Vulpo — bel-
akiro.*

PORKO

*La porkon al sinjora kort' hazarda
vago pushis,
Che stalo kaj lavej' kotajhon ghi
ektushis,
En ajna malpurajh', ghi kun agrablo
kushis,
Per akvo de forlav' ghi banis sin kaj
dushis,
Kaj venis kun efekt'
De porka belaspekt'.
"Nu, kion vidis vi, Porkulo mia kara?"
Demandis ghin Pashtist':
"Ja oni diras kun persist',
Ke vivas por plezur' richuloj en
ekzist',
Ke ili ghuas nur pri richo
senkompara."
Responde gruntas Pork':
"Absurd' kaj vanta vort'.
La famo pri richec' ja estas plen-
erara:
Trovighas tie nur malpur' kaj simpla
kot',
Kaj tamen faris mi tre multe por
esploro,
Mi fosis kun fervoro En tuta besta*

kort'."

*Ne volas mi ofendi en kompar'!
Sed chu la kritikist' al Porko ne
similas,*

*Se li je chiu verk' nuf pri malbon'
babilas*

Dum sia jughdeklar'?

ELEFANTO KAJ MOPSO

*Lau stratoj Elefanto pasis
Por montro al publik'.
En nia norda land' ghi estas ja
unik', —
Do post la best' gapuloj plen-amasis.
Subite iu Mops' aperis en la strat', —
Kaj al giganta best' sin jhetis kun
audaco.
Jen bojas, saitas ghi sen laco
Kaj pretas jam al batalad'.
"Amiko, estu vi prudenta,"
Shaf-hund' avertas nun: "Ghi estas
evidenta, —
La best' superas vin. Vi raukas pro
koler',
Sed ghi en ver',
La bojon en la strat' tutplene ne
atentas."
"He, he! Pri tio mi kontentas."
Respondas Mopso kun fier':
"Ja sen batigh' efekta
Famighos mi je batemul' perfekta.
Do diru hundoj kun respekto:
Plejfortas Mopso, sen demand', —
Ghi bojas kontrau Elefant'!"*

KVARTETO

*Petola best' Simio,
Saghul' Azen',
La Kapro kun solen-mien'
Kaj Urso sen gracio —
Decidis pri kvarteta lud'.
Jen estas notoj, instrument' muzika
Kaj en herbejo — lok' unika —
Plenravos ili mondon, sen diskut',
Ekfrotis archa ar', sed veas la rezult'.
"He, haltu vi!" Simio krias: — Ne
rapidu!
Por belo de muzik' lau ordo vi eksidu.
Amiko baso Urs', vi sidu kontrau ald',
Kun violon' kontrauos mi en paro,
Jen tiam en muzik' aperos la ekzalt':
Dancigos ni betulojn en arbaro."
Eksidis ili lau propon',
Sed en la muzik' — la sama ton'.
"Atentu! Estas jen rezon' ",
Azeno krias: "Por muzik' efekta
Ni sidu en linio rekta".
Eksidis ili lau azen-supoz',
Sed en Kvartet' rezultas nur hhaos'.
Do pligrandighis nun la forto de
diskutoj
Kun la disputoj*

*Pri ordo kaj pri lok'.
Hazarde Najtingal' alflugis sen
alvok',
Kaj oni petas ghin pri helpo en la
kazo.
"Sufichas unu hor' por estu certa
bazo
Al la Kvartet'. Ni petas pri konsil',
Jen notojn havas ni, jen estas
muzikil',
Nur diru pri sidloka stil'".
"Por esti muzikist' ", ghi diris kun
emfazo:
"Necesas lerni pri la bel'
Kaj senton havi en orel'.
Do sendepende de sidloko
Muziko via estas moko".*

KOKO KAJ PERLO

*La Koko dum bekad' senchesa
En sterko trovis perlon lau okaz'
Kaj diras grave kun emfaz':
"Jen ajho malnecesa!
Stultuloj taksas ghin per tute granda
prez',
Sed estas multe pli prefera por
enspez'
Hordea simpla grajn': ne multe ghi
imponas,
Sed saton donas.*

*Por sensciul' similas paralel':
Gravajho sen kompren' nur shajnas
bagatel'.*

CIGNO, EZOKO KAJ KANKRO

*Se inter homoj mankas la konsent;
Afer' ilia estas nur turment'
Kaj en rezulto restas sola moko.
Jen Cigno, Kankro kaj Ezoko
Decidis pri la shargh-transport'
Kaj jungis sin al charo en konkord'.
Tre strecha estis pen', sed char'- sur
sama loko.
La shargh' por ili estus bagatel',
Sed Cigno strebas al chiel'
Por Kankro — dorsa ir', al akvo —
tir' Ezoka.
Pri kulpo kaj pravec' ne estas nun
deklar',
Sed sur la sama lok' ghis nun
senmovas char'.*

KORNIKO

*Vi trafos al ridinda stato nur,
Se vi perfidos krude al natur'.
La simpla hom' ne revu pri nobelo,
Kaj se vi estas nano lau statur',
Ne strebu vi al granda ait-nivelo,
Sed pensu kun modest' pri via simpla
stat'.*

*Per pavaj plumoj luksa, lau parad',
Korniko kun fier' en Pava kort'
promenis,
Kaj ghi imagis jam en tro-memfid',
Ke pro la pompa vid'
Konatoj kun chagren' al ghi envion
tenis,
Ke ghi parencas nun al pava bela
gent'
Kaj taugas la moment'
Farighi en la kort' majesta eminent'.
Sed baldau krevis for la ambicio
stulta.
La Pavoj pinchis ghin per bekoj kun
koler'.
Ne nur sen fremda plum', ghi restis
en mizer'
Sen propra plum-kovrajh'; senhelpa*

*kun sufer',
Ghi fughis en rapid' de prem-atako
multa.
Forkuris tiam ghi al sia hejma strat',
Sed la parenca gent' kornikon ne
rekonis.
Per pincho kaj bekad' al ghi
turmenton donis.
Do kia estis rezultat'?
De la kornikoj ghi foriris,
Al Pavoj ne transiris.*

*La fablon mi klarigos lau konkret'.
Filin' de komercist' Matrona tre
sopiris,
Shi revis pri aligh' al nobla societ'.
Kaj dank' al doto chirkau miliono,
Farighis shi edzino de Barono.
Sed nova parenkar' riprochas shin
Pri la malnobla burgha origin',
Dum propra famili' — pii la nobel-
inklin'.
Kaj estas nun Matrona en praktiko
Nek Pavo, nek Korniko.*

SERPENTO KAJ SHAFO

*Serpento tenis sin sub iu shtipo
Kaj pri la mond' koleris ghi.
La furioza emoci'
Ghin regis akre, lau principo.
Shafido en proksim' ghøj-saltis sen
atent',
Sen iu penso pri Serpent'.
Subite la Serpent' elrampis kaj
ekpikis:
Dolora pik' al mizerul' efikis.
Ekbrulis sango pro venen'.
"Sed kia estas kulp'?" ghi diris kun
chagren'
"Vi eble por atenc' alvenis",
Serpento siblis kun koler':
"Ni punas vin averte, pro dangher' ".
"Ho, ne!" respondis Shaf' kaj morto
ghin forprenis.*

*Por homo kun malbona kor',
Sen amikec' kaj am-humor'
La mondo estas fia nulo,
Persono chiu — nur krimulo.*

KAFTANO DE TRISHKO

*Al Trishko sur kubut' truighis la
kaftano.*

*Sen longa medidad', per sia propra
mano,*

*Li tranchis de manik' peceton for
Kaj flikis truojn kun fervor',
Kaftan' — en bona stat', nur la
manikoj achas.*

*"Ne gravas! Mi al tio krachas,"
Sed tamen oni mokas lin.*

*Do Trishko diras: "Per kombin'
Riparos mi difekton tute,
Kaj longo de manik' normalos
absolute."*

*Ho, Trishko lertas en afer'!
Li tranchas baskojn de la vesto,
Manikoj jam longighis en prosper',
Sed la kaftano mem mallongas en
mizer'*

Ja kvazau kamizol' modesta.

*Jen estas por ekzemplo la okaz':
Sinjoro en financa embaras'
Por malimpliko tre agadas.
Rezulto: en kaftan' de Trishko li
paradas.*

LUPO KAJ PASHTISTOJ

*La Lupo en proksim' de besta kort'
Ekvidis tra fendajh' en pord',
Ke la plej bonan shafon de la grego
Pashtistoj buchas en trankvil',
Dum hundoj kushas kun humil',
Kaj diris li en la chagren' grandega:
"Ho, kiel vi tumultus kun rabi', Se
tiun samon farus mi!»*

IDOLO

*En iu templo staris la Idol',
Per orakoloj trafaj ghi imponis,
Al homoj ghi konsilojn saghajjn donis.
Pro tiu servo la popol'
Ornamis ghin arghente kaj per
oro, —
Kaj estis al diajho plen-honoro
Per richa vest', oferoj, pregha zum'
Kaj per incensa fum'.
Al la Idolo oni kredis plene.
Sed jen — miraklo kia kaj terur'!
Ekdiris la Idol' stultajhojn nur:
Respondas ghi mallerte kaj singhene,
Kaj al demando ajna — en malord'
Mensogas ghi per tute stulta vort'.
Jen homoj pri afer' sincere miras:
"Strangajho kia!" oni diras.
Sed estis simpla la sekret':
En la interno de Idol-profet'
Sin kashis pastroj por respondo.
Dum sidis en Idol'
Prudenta pastro — estis kun prudent'
parol',
Lin shanghis stulta hom' — kaj por
popol'
Farighis la diajh' plej stulta en la*

mondo.

*En la pasinto, audis mi,
Jughisto iu eminentis;
Li en jughado tre prudentis,
Dum sidis apud li kun sagh'
sekretari'.*

MENSOGULO

*De malproksima lando post' reven'
Nobelo iu, dum promen'
Kun la amiko en la kampo vasta,
Rakontis pri vojagh' en ton'
bombasta
Kaj multe li mensogis dum rakont'.
"Ne vidos mi, sendube, en estont'
Similajn ajhojn de vojagho lasta.
Vetero via estas sen preciz':
Jen tre malvarmas, jen varmeg'
kruelas,
Jen mankas sun', jen ghi tro brile
helas.
Sed tie estas vera paradiz'!
Ilia viv' ghis nun al mi impresas!
Nek palto, nek kandel'! Ja ili ne
necesas.
Forestas tie nokto kaj malklar',
Kaj regas maja tag' dum tuta jar'.
Kaj en laboro oni ne fervoras,
Sed se vi vidus, kio kreskas, floras!
En Romo la kukumo estas glora
Ho, mia Dio plen-favora!
Chu kredas vi tutplene al rakonto?
Ghi estas granda kiel monto!"
"Mirindas certe! " diris la amiko:*

"Mirakloj estas chie sur la ter',
Sed ni ignoras ilin en praktiko.
Jen havu vi ekzemplon de mister':
En nia lando estas ghi uniko
Asertas mi precize, kun sincer'.
Jen vidu ponton larghan sur river',
Ni iras tien. Simpla lau ekster',
Sed tre mirinda, oni devas diri.
Nek unu mensogul' kapabhs ghin
trairi;
En mezo de la pont'
Trafalas li kun hont'.
Sed homo, kiu veron shatas,
Sur tiu ponto iras kaj bonstatas."
"Chu la trafal' minacas per
dangher'?"
"Profundas la river'.
Jen kia mirindajh'. Kaj tion mi
konstatas.
Do kvankam grandas la kukum' en
Rom', —
Al monto, diris vi, similas la legom'..."
"Ne, ghi ne estas mont', ghi larghas
kiel dom'."
"Miraklo granda!
Sed samas ponto nialanda,
Al kiu iras ni. Vi kredu sen demando,
Por mensogul' fatale ghi funkcias.

*En la printemp', dum iu hor',
Trafalis de la pont' (la tuta urbo
scias)*

*Du ĵhurnalistoj kaj tajlor'.
Sendube, la kukum' kun dom-aspekto
Miraklo estas lau grandec-efekto."
"Ne estas ghi miraklo por respekto,
Kaj en konkludo vi malpravas:
Domegojn Romo ja ne havas
Kaj tie nur domachoj ordinaras,
En kiuj homoj du apenau staras
Au sidas en mizer'."*

*"Ghi estu tiel, tamen mi konfesas,
Ke la kukum' mirindas sur la ter'
Se homoj du okupi ghin sukcesas.
Sed kiel lerta estas nia pont'!
Apenau mensogul' surpashas ghin
sen hont'*

*Trafalas li senpere.
Kaj kvankam la kukum' mirigas
nin..."*

*«Atentu!» Mensogul' avertis lin:
"Anstatau tiu pont', transvadu ni
prefere."*

KATO KAJ EZOKO

*Ghi estos malfelich', se bakos la
botisto
Kaj botojn faros la bakisto.
Atendas ilin ambau malsukces'.
Mi diras rekte, lau konfes':
En la meti' malklera amatoro
Obstinas ofte sen rezon', —
Rezulte por afer' okazas nur la ploro,
Kaj pro obstino sen bezon'
Famighas malklerul' al moko plene,
Char spertajn homojn por ekkon'
Li ne konsultas laukonvene.*

*Jen venis la ideo al Ezok'
Praktiki Kat-metion dum la nokt'.
Chu logis lin diablo per envio
Au tedis jam fishmangha tradicio,
Ekpetis li al Kat' kun tre insista lert'
Lin preni kune al chasado
Por kapti musojn al desert'.
"Chu konas vi aferon, kamarado!"
Demandis lin la Kato kun avert':
"Al mus-kaptad' vi tute ne kutimas,
Ne vane oni bel-esprimas,
Ke la afero majstron timas."
"Ne diru, amikul'! Chu estas ghi*

afero?

Kaptadis mi ech perchojn en rivero!"

"Do iru ni, kaj helpu nin la sorto!"

Post plena plezurigh' satmanghis Kat'

Kaj iras li al sia kamarad'.

Sed al Ezoko voston manghis rat',

Kun malfermita bush' li kushas

preskau morta.

Vidante, ke Ezok' ne taugas al

kaptad',

La Kato-amikul' fortrenis lin al lag'.

Kaj nun, Ezok', anstataŭ ghuo

Por vi instruo!

Estonte vi prudentu

Kaj musojn ne atentu.

AKVOFALO KAJ RIVERETO

*Bruanta Akvofal' defalis kun sever'
Kaj al kuraca font' ghi diris en fier'
(Sub monto en angul' nerimarkeble
tute*

*Murmuris en modest' malgranda tiu
font'):*

*"Je akvo estas vi malricha absolute,
Vizitas tamen vin la tuta mond'!*

*Impresas mia fort' per la potenc-
minaco,*

*Per kio logas vi?" — "Tre simple, per
kuraco,"*

Audighis en modest' respond'.

MUZIKISTOJ

Invitis grandsinjor' najbaron por tagmangho.

Favoris li al kantoj kaj muzik'

Kaj volis al najbar-amik'

Kantistojn montri per la hhorarangho.

Ekkantis vigla hhor' hhaose kaj sen ord',

Kun falsa ton', kun krio senmezura.

En kapo de la gast' estighis bruo nura

Vertighon havis li pro tiu kanterekord'.

"Indulgu min!" li diris kun ekmiro:

"Kriachas kantistar'. La tuta hhor' Absurdas kun fervor!"

"Ghi estas vero, mankas la inspiro,

Kaj ili falsas nun en certa grad',

Sed tamen fremdas ili al drinkad'

Kaj bonkonduktas chiu viro."

Al tio diras mi: vi drinku en prefer',

Sed taugu por afer'.

GRANDSINJORO

*En la antikvo iu Grandsinjoro
Transmigris en subita horo
Al vasta regno de Pluton'.
Pli simple — mortis la person'.
En la infer' al jugho li alvenas.
"Jen kiu vi? De kia lok' devenas?"
"Mi estas el Persuj', satrapo — mia
rang',
Sed dum la viv' je sano estis mank',
En regiono mi ne regis,
Sekretario chion flegis."
"Sed kion faris vi? " —
"Mi dormis, sate manghis,
Subskribis kion li aranghis".
"Al paradizo tuj!" — "Sed kie estas
justo?"
Ekkriis sen ghentil' Merkur' per tuta
brusto.
"Ho, frat'!" respondis nun Eak':
"Vi estas sen kompren' pri ordinara
ag'.
Stultulo estis li! Kaj se en sia fak'
Li regus kun potenco,
Malbona estus konsekvenco, —
La tuta region' disfalus je ruin',
Netolerebla estus vivo...!"*

*Al paradiz' ni sendu lin
Pro lia senaktivo."
Hierau vidis mi jughiston dum
jughad' —
Nu, certe trafos li al regno de beat'.*

LUPO EN HUNDEJO

*Dumnokte iris Lup' al korto shafa,
Sed estis li. maltrafa:
Erare venis li al hunda kort'.
Pro veno de grizul' alarmis tuta stalo,
Ekbojis la hundar' kaj strebis al
batalo.*

*"Rabisto jen!" alvokis kria Vort', —
Kaj tuj fermighis korta pord'.
Momente la hundej' farighis la infero.*

*Jen kuras homoj kun baston-armil',
Jen kun fusil',
Jen flagras torchoj en tremanta bril'.
La Lupo en angul' sin premas en
mizero,*

*Kun tima dentoklak' kaj kun kuspita
fel';*

*Li manghus chiujn certe en kruel',
Sed li komprenas nun, ke mankas la
espero.*

*Ke fine venis vengha hor'
Por chiu shafa plor', —
Do la ruzulo kun fervor'*

Ekdiplomatas:

*"Amikoj miaj, kial estas bru'?"
Mi estas via frat', nur frat', - nenio
plu.*

*Por paco venis mi, pri tio mi
konstatas.*

*Forgesu pri pasint', ni vivu en fortun'.
La shafojn en kampar' ne tushos mi
de nun,*

*Kaj zorgos kiel frat' pri shafa
oportun', —*

*Kaj jhuras mi per lupa vort' impone,
Ke mi..." — "Auskultu vi, najbar',"
Chasist' rebatis al deklar':*

*"Vi estas ruza best', sed mi kun griza
har',*

Naturon lupan konas mi tre bone.

*Preferas mi kun Lupo, la sinjor',
Pritrakti pacon lau kutima mor':*

Post kiam lia felo estos for'."

*Kaj hundojn kontrau Lup' ellasis li
rezone.*

VULPO KAJ VINBEROJ

*Malsata Vulpo venis al gharden';
En ghi vinberoj rughis sur la vito.
Ekkaptis Vulpon granda apetito.
Vinberoj en abund' similis al ruben'.
Nur unu manko — alte ili pendas.
Atingi ilin estas vana tent', —
Okulo ja pretendas,
Sed malproksimas dent'.
Post unu hor' kun malplezuro
Foriris Vulp' dirinte en koler':
"Ghi shajnas bela en super',
Sed verdas, — mankas la maturo:
Acidas certe la vinber'."*

DU KNABOJ

*"Auskultu, bon-amik'! Ne estu ni
azenoj,
Dum leciona pauz' proponon havas
mi:*

*Por la kashtan-rikolt' mi iru al
ghardeno."*

*"Ne, Fedja, tiu mangh' ne estas nun al
ni,*

Tro alta estas arbo.

*Ne povas ni alrampi ghis la frukt'
Kaj tute fremdas nin alloga mangh-
produkt'!"*

*"Ne timu, kamarad'! Plej helpos nin
konjekto!*

*Ja kie mankas fort', necesas intelekto.
Elpensis chion mi lau sagha bon-
arangh':*

*Vi helpu min alrampi nur al branch',
Atingos mi la fruktojn lerte,
Kashtanojn manghos ni ghissate,
certe."*

*Jen ili al gharden' ekkuris kun rapid',
Kaj Senja al amik', al Fedja helpis
multe,
Por grimpu kamarad' al arbo bon-
rezulte,*

*Ne vana estis help' kun granda pen'
kaj shvit'.*

*Al supro venis jam la knabo en
sukceso.*

*Kashtanoj en abund'. Mirindas la
impreso!*

Verdire estis ghi richajho, kaj senfin'!

Chu eblas nun kalkuli ghin!

La knabo havas multon por profito,

Ech por donac' amika lau merito, —

*Kaj Senja sur la ter' rigardas kun
manghem',*

Sed estas de rigard' mizera nur efiko,

Char Fedja manghas fruktojn mem

*Kaj jhetas de la arb' nur shelojn al
amiko.*

Lertulojn vidis mi en viv'

Por kiuj bon-amikoj kun naiv'

Al supro rampi helpis kun fervoro,

*Sed poste shelo ech ne falis de
sinjoro.*

TRIOBLA EDZO

*Okazis, iu Edz', frivola lau naturo,
Ankorau havis du edzinojn en sekret'.
Skandala tiu fam' atingis en konkret'
Al Regho mem. La Regh' kun
malplezuro
Eksciis pri afer'
Kaj tuj ordonis li prijughi kun sever'
Kaj frapi al fripon' per tia akra puno,
Ke terurighu la popol'
Pri abomeno de frivol'
Kaj pri la krimo-maksimumo.
"Kaj se ekscios mi, ke pun'
malgrandas nur,
Ekpendos jughistar' sur unu granda
shnur'."
Malbonas la promeso:
Jughistoj tremas en malvarma shvit',
Diskutas ili sen sukceso
Pri ekzekut' konvena, lau merit'.
Diversas pun-sistem', sed tamen por
publiko
La punoj en abund' mizeras per efiko.
Finfine jughistar' alvenis al konklud'
Kaj al krimul' en tribunal-kunsido
Audighas jugh-decido:
"Edzinojn chiujn tri li havu sen*

*divido,
Kaj plu neniu sekvu persekut'."
Ekmiris pri verdikt' popolo tre
rezone, —
Jughistojn en komplet' pendigos certe
Regh'.
Sed ne forpasis nur semajno ech
Kaj la krimul' pendigis sin persone.
Ghi estis lecion' por tuta imperi'
Kaj al edzinoj tri
Neniu plu edzighis laufripone.*

SKATOLO

*Ni ofte pensas pri fervor'
Kaj pri neceso de labor',
Ja kie taugas nur konjekto
Por simpla solvo de projekto.
De fama majstro venis Skatolet'.
Belega estis ghi, plej luksa en figuro,
Kaj chiu pri Skatol' admiris sen
mezuro.*

*"Skatolo estas kun sekret',"
Proklamas nun saghul' de
mehhaniko:*

*"Forestas en Skatol' serur'.
Kaj tamen mi malfermos ghin, amiko.
Sed vi ne moku tion nur!*

*Sekreton solvos mi sendube kun
sukces',*

En mehhanik' mi majstras iom, jes."

*Do li komencis studon por afer',
Cerbumas zorge pri mister',
Aplikas li por provo chian frapon,
Jen premas li najleton, jen la klapon,
Sed vana estas la turment'.*

*Balancas iu kapon,
Jen oni flustras moke en silent'.*

Kaj oni audas jam senchese:

"Ne tiel, tute ne! Denove malsukcese!"

*Li shvitis sen ripoz', lacighis ghis la
fin',
Kaj laste lasis lin obstin'.
Malfermo de Skatol' enigmis sen
shlosilo,
Sed simpla estis ghi — per levo de
kovrilo.*

LEPORO DUM CHASO

*La besta bando kun avid'
Sufokis urson sur ebena, —
Kaj por regalo dum festeno
Jam chiu besto por divid'
Arbitre parton sian prenas.
Leporo pro hazard' orelon ursan
trenas.*

*"He vi, amik' kun straba vid!
De kie venis vi sen voko?
Ne estis vi entute dum chasad'!"
"Kaj kiu dum invad'
La urson el arbaro pelis sen kompat'
Kaj pushis lin al kampo por sufoko?
Chu mi ne faris tion kun fervor'?"
Ghi estis fanfaron' absurda,
senkonvena,
Sed je amuzo ghi ekshajnis plena
Kaj parton de orel' ricevis la Lepor'.*

*Ridinda estas hom' en fanfaronano,
Sed ofte trafas lin porcio dum
disdono.*

DANCO DE FISHOJ

*Pro plendoj multaj de popol'
Pri maljusteco kaj arbitra vol'
De richaj homoj — la Leono
Ekiris por esplor' de tuta regiono.
Samtempe la Kampul' che varma
flam'*

*Intencis fishojn friti sur la pato.
La fishoj tremis pro varmego jam
En la atend' de morto sen kompato.*

Jen al Kampulo kun minaca ton'

"Vi kion faras?" diras la Leon'.

"Potenca regh'!" respondis la fripon':

"Mi estas estro de popol' rivera

Kaj tiuj — delegitoj apud mi,

Por la salut' alvenis chiu ni,

Al via Moshto plej supera".

"Nu, kiel fartas ili en river'?"

*"Regnestro granda! Regas nur
prosper'*

Kaj chiutage lautas nia pregho

Pri via longa viv', potenca regho."

*(Kaj fishoj sur la pat' baraktis en
sufer').*

"Sed diru vi, por kia cel'

La vostojn ili svingas tiel treme?

"Ho, sagha regh'! Pro ghojo kaj fidel'

*Jen ili dancas tre dankeme."
La bruston de Kampul' eklekis la
Leon',
La fishojn en dancad' rigardis kun
impon',
Kaj plu ekiris li tra sia region'.*

EZOKO

Denuncis oni pri Ezok'
Ke li teroras en proksima lago,
Da pruv-atestoj venis granda stok'
Kaj al jughej' en largha trog'
Alportis oni lin pro lia krima ago.
Jughistoj estis en proksim':
Sur la herbejo kaj deklivo
Sin pashtis ili lau kutim',
Iliaj nomoj restis en arkivo —
Du Chevaloj, Kapro kaj Azen'.
Kaj por necesa ordo kaj observo
La Vulpo estis prokuror' en servo.
Al tiu Vulp', lau onidira vort',
Ezok' liveris fishojn ghis la kort',
Sed tamen jughistar' favoron ne
praktikis.
Por tiu foj' forestis oportun'
Ne vidi pekojn de Ezoko nun;
Necesis jam decido pri la pun',
La mort-verdikton jughistar' indikis,
Proklamis ghi pendigon pro afer'.
"Honora jughistar'!" komencis Vulp'
diskuton:
"Chu taugas la pendig'? Ni faru
ekzekuton
En plej terura form', rigoran, kun

sever',
Al tuta friponar' ghi estu leciono:
Dronigo en river'- jen estas la
propono!"
Jughistoj krias: „Estas ghi rezono!"
Kaj la Ezoko trafis al river'.

POPOL-KUNVENO

*Ekzistu ajna ordo kaj tendenc',
Sed homoj sen la konscienc'
Eltrovos chiam manieron
Por utiligi la aferon.*

*Lup' petis al Leon' shafestro nomi lin.
Pro la klopodoj de Vulpino
Lin rekomendis Leonino.
Sed char al lupoj estas malinklin',
Por ne farighu klachoj lau kutim'
Ordonis tiam suveren'
Alvoki bestojn al popol-kunven'
Kaj pridiskuti dum kunsido,
Chu decas nun al Lupo la konfido.
Jen chiu bestoj venis lau ordon'
Kaj en kunven' parolis' kun rezon',
Sed kontrau Lup' nek unu vort'
rigida.
Do tiel trafis Lup' al shafa kort'.
Sed kial en kunven' la shafoj ne
protestis?
Ja ili certe tie estis!
Ne! Shafoj pro hazard' kunvenon ne
cheestis,
Kaj ghuste por afer' necesis shafa
vort'.*

LEONO DUM CHASO

*La Lupo, Hundo, Vulpo kaj Leon'
En najbareco foje estis
Kaj ili por la viv-bezon'
Kontrakton manifestis:
Chasadon fari per komun-batal',
Dividi chion lau egal'.
La Vulp' unua faris servon:
Per artifik' ghi kaptis cervon
Kaj vokas nun amikojn al kunven'
Por la divido de felicha pren'.
Kaptajho estas certe bona!
Alvenis chiuĵ. La Leon' impona
Ungegojn montras kun koler-mien'
Kaj pri divido laute diras:
"Ni estas kvar, amikoj, por festen'»
Kaj cervon li en kvar porciojn shiras:
"Nun estas distribu'! Rigardu kun
atent':
Jen mia parto lau konsent'
De la kontrakt-propono.
Kaj tiu part' por mi, ĉar estas mi
Leono.
Kaj tiu part' por mi pro mia eminent'.
Kaj kiu lastan parton pro hazardo
tushos,
Sen vivo sur 1a kampo kushos."*

KAMPULO KAJ SERPENTO

*Al la Kampul' alrampis la Serpent'
Kaj diras ghi: "Mi estas nun amiko.
Ne timu tute min kun tremo kaj
paniko.*

*Alia estas mi, rigardu kun atend':
Jen novan hauton mi posedas."
Sed tamen la Kampul' Serponton ne
ekkredas.*

*Hakilon kaptis li
Kaj diras: "Malgrau hauto nova
La sama restis kor' al malbonajh'
tutpova."*

*Kaj li mortigis ghin kun frapa energi'.
Se kauzis vi malkredon en afero,
Ne savos vin la masko de malvero.
La bela masko ne defendos vin,
Al vi minacos de Serpento fin'.*

KOKO KAJ KUKOLO

"Vi kantas, mia Kok', tre laute kaj solide!"

*„Kaj vi, Kukolo-charmulin',
Belkantas flue, malrapide:*

Neniu en arbar' en kant' similas vin!"

"Mi audus vin, amiko, vivon tutan."

*"Kaj kiam vi, Kukolo, eksilentas,
Auskulti vin denove mi atentas,
Belkanton vian kvazau flutan...*

De kie venas tia vocho?

Kun milda tono, pura, sen riprocho!...

*Ne grandas via kresk', sed estas vi
surpriza,*

*En kanto cedas vin, sendube,
najtingal'!*

"Mi dankas vin, sed certe en real'

*Per kant' superas vi al birdo
paradiza.*

Atestas tion tute la publik'."

*Jen diras la paser': "Amikoj de
muzik'!*

*Vi laudas vin tre dolche kaj kun flat',
Sed malgrau via laud' malbonas la
kantad'!»*

Do kial per la bel-parol'

La Kokon laudas la Kukol'?

Char estas Kok' en sama rol'.

SCIURO

*Dum festo, sur vilagha plac'
Che bienula dom-palac',
Amasis la popolo:
Sciuron en turnigh' ghi gapis sen
parolo,
En rado kun rapid' movighis la sciur'.
Alternis en kurad' piedoj de la besto,
Kaj turdon sur betul' mirigis lerta
kur':
"Bonkora kamarad', respondu por
atesto,
Vi kion faras en rapid'?»
"Amik'! laboras mi sen iu intermit'.
Mi estas kurier' che mia grand-
sinjoro,
Kaj mankas tempo dum la tag'
Por la ripoz' au mangha ag'."
Kaj la Sciur' en rad' rekuris kun
fervoro.
La turdo diris simple kaj kun mok':
"Vi kuras en rapid', sed sur la sama
lok'."
Okazas, praktikul' en sia taglaboro
Klopodas, ardas en agad',
Plenforte penas li progresi,
Sed tamen en movad' ne povas li*

*sukcesi,
Samkiel la Sciur' en rad'.*

URSO LABOREMA

*Kampulo faris en arbaro
Lignajhajn arkojn por profit'
(Laboris li trankvile, sen rapid'), —
Kaj Urs' imitis lin en tiu sama faro.
Jen bruas en arbar' krakad' sen
intermit',
Audighis frapo ghis arbara rando.
Diversajn arbojn en abunda grando
Ekstermis Urso sen kalkul',
Sed en rezulto estis nul'.
Jen al Kampul' por konsultad' li iras.
"Najbaro mia", Urso diras:
"Mi rompas arbon en moment',
Kurbigi ghin forestas la talent'.
Sur kio bazas sin la profesi-scienco?"
"Sur simpla ajh'," respondas la
najbar':
"Forestas ghi en via far':
Sur pacienco."*

LEONO KAJ VULPO

*Al Vulpo tute fremdis la Leon';
Vidinte lin ghi tremis sen rezon'.
Post kelka temp' Leonon ghi revidis,
Sed timo Vulpon jam ne gvidis.
Kaj triafoje dum renkont'
Babilon ghi komencis kun volont'.
Ni ankau ofte iun timas,
Se tiu homo malproksimas.*

SHTONO KAJ VERMO

*"Jen kiel bruas ghi! Persono malghentila!"
Pri pluvo grumblis Shton' en tono maltrankvila:
"Kaj oni laudas ghin sen limo kaj mezur'!
Aklamas oni ghin ja kvazau gaston karan,
Sed kion faris ghi elstaran?
Dum horoj du au tri ghi pluvis nur.
Menciu oni min sen lauta frazo:
Dum tuta mia viv' obeis mi al sort',
Modeste kushas mi en ajna lok' okaza,
Sed de neniuj venas dankaj vort'.
Riprocho pri maljust' ne estas ja senbaza.
Forestas en la mond' justec' en sia gherm'."
"Silentu vi!" respondis tuj la Verm':
"Ja kvankam pluv' ne estis tre impona,
Forigis ghi soifon de la ter', —
Al seka kamp', senforta pro veter',
Kaj por kampul' aperis nun esper'.
Sed vi sur kampo estas senbezona."*

*Chu gravas por afer' la kvardekjara
spert',
Se plenas dum la viv' senago kaj
inert'?*

DRAKO

*En la chiel', tre fore de la ter',
Papera Drak' fluganta en aer'
Al papilio krias kun fier':
"Auskultu, kiel vi malgrandas sube!
Envio trafas vin sendube
Pro mia alta flugo en chiel'."
"Ho, tute ne! Ghi estas bagatel'.
Vi vane pompas kaj solenas!
Vi flugas en altec', sed shnuro vin
retenas.
Do, malgrau via alt-nivel',
Ne estas vi proksima al felicho.
Modestas mia vivkondicho,
Sed flugas mi ja tute sen kontrol',
Lau mia propra vol',
Nek bruas, kiel vi, per zumo multa
Kaj stulta
Dum vivo tuta en amuza rol'."*

BUNTAJ SHAFOJ

*La buntaj shafoj nauzis al Leon'.
Ekstermi ilin — estus tre facile,
Sed por prestigho — malutile —,
En la arbaro regas li sur tron'
Ne al perfida murdo kaj sufoko.
Kaj tamen bunta shaf' nur estas
abomen'.*

*Chu eblas la likvido sen provoko?
Jen li alvokas al konsult-kunven'
La Urson kaj la Vulpon por subten'.
Kaj en kunsido li deklar-raportas,
Ke la rigard' al bunta shafa spec'
Al li turmenton por okuloj portas, —
Minacas lin, vershajne, la blindec'
Kaj ghin eviti tute li senfortas.
Jen Urso al Leon' ekgrumblis kun
obtuz':*

*"Sed kial ni parolas tiom vaste?
Ordonu senprokraste
Sufoki shafojn tute, sen konfuz'."
Sulkigis brovojn la Leon' kaj Vulpo
Humile diras: "Nia bona.reg'h',
Al besta persekut' vi ne kapablas ech!
Ne vershos vi la sangon de senkulpo.
Permesu min sugesti pri afer':
Herbejo bona estas che river',*

Nutrajh' abundas tie por la grego,
Por promenado — plena liberego.
Kaj al plenumo de pashtista rego
Vi. sendu Lupon por prosper'.

Al mi tre shajnas, estas antausento,
Ke mem per si pereos shafa gento.
Kaj dume vivos ghi felice kaj sen
mank'.

Che ajna akcident' vi restos ja en
flank'."

La vulpa opini' entute jam superis.
Bonege en praktik' rezultis la
fervor', —

Ne nur la shafoj buntaj lau kolor',
Ech simplaj malaperis.

Sed kion diras bestoj kun persisto?
Bonkoras la Leon', sed Lupo — jen
rabisto.

MIRONO

*Jen vivis en la urb' magnat-richul'
Miron'.*

*La nomon uzas mi ne pro la vers-
valoro,*

*La nom' de tiu hom' utilas por
memoro.*

*Pri tiu plenrichul' en tuta region'
Najbara prave krias,*

*Ke lia posedajh' ja estas milion',
Sed fremdas la richul' por ajna helpa
don',*

*Kaj tamen kiu gloron ne envias?
Por laudoj de popol' por estu nom-
ornam'*

*Jen pri Miron' estighis fam',
Ke en sabatoj li almozon donas.*

*Kaj fakte, lia kort' al chiuj sin
disponas,*

*Sen riglo tute estas la pordeg'.
"Ho", pensos vi, "Bankrot' okazos
rekta!"*

*Ne timu, estas li en avarec' konjekta:
Li en sabata tag' dechenas hundojn
dek.*

*Por almozul' ne nur bonvena vorto,
Apenau en sekur' forkuras li de korto.*

*Sed dume je sanktul' famighis jam
Miron'.*

Kaj oni diras en la strato:

"Miron' farighis mecenato.

*Bedaure la hundar' kruelas sen
bezon',*

Malhelpas ghi alvenon al peron',

*Sed estas mem Miron' lau Kristo
frato."*

Rimarkis ofte ni pri sama mank',

Ke tre komplikas vojo al palaco.

Do kulpas tlon hundoj kun minaco —

Sed mem Mironoj estas ja en flank'.

KAMPULO KAJ KAMP- LABORISTO

*En malfelicha kaj minaca hor'
Ni preghas ofte al persono
Nin protektanta de malbono.
Sed kiam la danghero estas for,
Savinton jughas ni severe, kun
chagreno,
Atakas kun insult',
Kaj se forestas kulpo en rezult' —
Miraklas fenomeno!
Kun sia laborist' Kampul' maljuna
Arbare iris en vespera hor'
Al sia hejmo, post labor'.
Subite en proksim' aperis urso bruna
Kaj al kampul' sen argument'
La urs' atakis en moment'.
La urso premas lin, kruele traktas,
Sub ghia korp' la mizerul' baraktas,
Jam venas fino de ekzist'.
"Stefano kara! Helpu pro honoro!»
Petegon audas laborist'.
Jen la Heraklo nova kun kuragha
koro
Kaj lau batala kortoplana stil'
Kranion ursan fendis per hakil'*

*Kaj ventron pikis li per forko kun
fervoro.*

*La urs' ekmughis nur pro vundo kaj
sufer',*

Ekfalas ghi kaj mortis.

La kamparan' levighis de la ter'

Kaj tuj al laborist' riprochon vortis.

Stefan' demandis kauzon de insult'.

*"Pro kio lautas mi? Azeno vi kun
stult',*

*Vi kial pro malsagh' atakis tiom
brute?*

Difektis felon preskau tute!"

CHEVAL-TRAJNO

*Kun potoj trajno veturila
Transiri devis de krutajh'.
Unuan charon por vojagh'
Kondukas mastro kun lertec' facila.
Chevalo forta, kvazau apogilo
Bremsadas charon sur dekliva lok',
Sed jun-chevalo laute kaj kun mok'
Desupre la fortulon plen-riprochas:
"Ho glor-chevalo! Jen miraklo!
Ghi rampas kvazau pro obstaklo,
Malrektas, kurbas, shtonojn krochas!
Kuraghu pli! Denove push'!
Maldekstren! Kia estas fush'!
Azen' mizera! Ne al mont' sin levas
Kaj ne dum nokto troti devas,
Malsupren iras vi, dum tag'!
Rigardi vin, — nur krevas pacienco,
Vi portu akvon kun azen-parencio.
Chu mi ripetos vin en via ag'?
Galope, en minuto, mi trakuros,
De mont' rulighos charo, ne veturos!"
Jen kun strechita Brust' en vigla
maltrankvil'
Ektrotis jun-cheval kun sia veturil'.
Apenau ghi atingis al deklivo,
Ekpremis ghin la charo kun masivo;*

*Ghi pushas jen de flank', de dorso en
senord',
Galopas la cheval' kun plej strechita
fort',
Senhalte, kun impeto brava,
Al shtonoj kaj kavajh' jen frapoj sen
reten'.
De saltoj longa chen',
Post frapo nova frap', kaj en
rezulto — kavo!
Adiau, potoj, sen reven'!
En homa societ' tre oftas sama
manko,
Agado fremda shajnas nur erar',
Sed se ekprovos vi pri sama far',
Pli grandan fushon vi produktos
ankau.*

DIVIDO

Komerca kamparan' enspezis lau merito

*Post la negoc' felicha kun sukces'
Tre multe da profito;*

Necesas nun divido de enspez'.

Jen regas en divid' disputo kaj ekscito

—
En la komerc' ghi estas tradici'.

Subite en la dom' okazis incendi'.

"Vi savu sen prokrasto

La varojn de la brul'!

Necesas urgha hasto,

Plipostos la kalkul'!"

Sed unu tuj ekkrias kun bombasto:

"Mi ne movighos for!

Mil rublojn donu, pro honor'"

"Postulas mij du milojn, jen kalkul'

"Vi estas naivulo!"

Senbaza estas la pretend'!"

Al brulo en la dom' forestis ech atent'.

Bruegis la sinjoroj plendispute,

Ghis fumo kaj haladz' penetris de tegment'

Kaj ili kun havajh' forbrulis tute.

Jen ofte en afer' de grava ord'

Pereo plena chiujn persekutas,

*Char mankas durn minac' konkord',
Kaj oni en vantec' disputas
Pri propra nur profito kaj komfort'!*

KUKOLO KAJ AGLO

*Kukolon Aglo nomis Najtingal'.
Kukol' en nova rolo,
Fiera plene pri titolo,
Komencis montri en real'
Talenton sian pri muziko.
Rezulte — chiuĵ flugis for
Kun moko au koler-humor':
Mizeris kanto lau efiko.
Al Aglo la Kukol' ekplendis kun la
kri':
"Pripensu do! Lau via regh-ordono
Nomighas Najtingalo mi,
Sed oni mokas min pri mia kanta
tono."
"Amik', mi estas regh', sed mi ne estas
dio.
Ne fortas mi influi al afer'.
Mi provis nomi vin, sed ghi ne estas
chio.
Vin fari Najtingal' ne estas mia sfer'."*

KAMPULO KAJ SHAFO

*Kampulo plendis kontraŭ Shaf',
Provokis li al kriminal-proceso.
Jughisto Vulpo agas kun sukceso —
Enket' esplor' lau paragraf,
Pri chiu punkto oni jugh-atestas,
Kaj kia pruv' por kriminalo estas?
Jen diras la. kampul': "En certa nokt'
Subite du kokinoj malaperis.
Matene en la kort' ostetoj nur
mizeris,
Kaj nokte estis Shaf' en tiu lok',"
De Shaf klarig': ghi dormis nokton
tutan,
Atestas chiu veron absoiutan;
Neniam ghi fi-agas nekonvene,
Chu per shtelad'
Au friponad';
Ne manghas ankau ghi viandon
plene,
Kaj la verdikt' de Vulpo tekstas jene:
"Rezon' de Shafo restu sen atent',
Pro kauz', ke en la art' de elokvent'
Friponoj majstras ege bone,
Char lau informo en dirita nokt'
La Shafo estis en la birda lok',
Kaj char bongustas la kokin' aldone*

*Kaj estis oportuna la okaz',
Konkludas ni en tiu kaz',
Ke Shafon logis granda tento
Kaj manghis ghi kokinojn en silento.
Rezulte ekzekut' okazu, en krue!,
Viando — al jughej', al plenda
flank' — la fel'.*

SIMIO

*Laboru vi per ajna manier'
Kaj tamen vin ne trafos kun fier'
Popola danko au la gloro,
Se estas sen util' laboro.
Kampulo de maten-auror'
Plugilon sur parcelo trenis.
Laboris li tre pene, kun fervor'
Ghis al vizagho shvito svenis.
Kaj por laboro estis la honor':
Jen chiu hom' kun simpatio
Salutas kaj tre laudas lin.
Al kamparan' envias nur Simio, —
Agrablaj laudoj logas lau kutim'.
Simio volas mem labori,
Kun shtip' komencis ghi fervori,
Kaj per fervoro kun honest'
Jam superplenas nia best'.
Jen shtipon pezan portas ghi,
Jen ghin klopode chirkauprenas,
Jen rulas, jen surtere trenas.
Plenshventas tute la Simi',
Apenau spiras ghi, sed ghin neniu
laudas.
Neniu por afer' al vi aplaudas.
Chu kauzon vi ne vidas kun facil'?
Vi dronas en labor', sed mankas la*

util.

NAJTINGALO KAJ KATO

*Ekkaptis Najtingalon Kat'.
Tenante en ungegoj kroche
Li diras milde kaj belvoche:
"Karulo charma, mia frat'!
Mi audis, ke en kanto
Vi, certe, estas triumfanto.
Rakontis Vulp-amik' al mi,
Ke via voch' ruladas kaj sonoras,
Ke oni vin tre shatas kaj honoras
Pri via charma melodi'!
Auskultus mi kun plena simpati'
Al via kanto senkompara.
Ne tremu tiel, lasu vin obstin',
Ekkantu ion ajn. Kaj poste al
kamparo
Mi lasos vin, — al boskoj kaj arbaro,
Muzikon shatas ankau mi sen normo:
Kun paca murmurad' ja ronkas mi en
dormo."
Kaj dume Najtingalo en mizer'
Apenau spiris pro sufer',
"Nu, bon-amik'! " daurigis Kato:
"Ekkantu ion, estu delikata."
Sed mankis bel-kantad', krietis ghi
kun ghem'.
"Chu ravas vi per tia fi-plorem'?"*

*Demandis Kato kun riprocho:
"Sed kie estas via bela vocho,
Ja kiun oni laudas en kortush'?
Min tedis de katid' simila kria fush'.
Ne! Por kantad' ne estas vi kapabla,
Senordas via melodi',
Sed eble sur la dent' vi estas pli
agrabla."
Kaj la kantiston manghis li
Kun placha delikato.*

*Chu mi klarigu fablon lau moral'?
Mallertas kante Najtingal'
En ungoj de la Kato.*

KAMPARANO EN MALFELICHO

*Al Kamparan', al provizeja lok',
Shtelisto trafis en la nokt'.
Li venis kun malbon-intenco:
Esploris chambron li de planko ghis
plafon',
Kaj chion shtelis la fripon'.
Chu por shtelist' ekzistas konscienco?
Vespere la kampul' ekdormis en
richec',
Sed en maten' vekighis malprospera,
Ja kvazau almozul' mizera
Malbonas la vekigh' de tiu spec'.
Do la Kampul' malgajas kaj sopiras,
Parencojn siajn vokas li kun plor',
Najbarojn chiujn petas pri favor':
"Chu vi ne helpos min en malfelicha
hor'?"
Jen chiu hom' konsilon taugan diras
Kaj saghas multe en rezon'.
"Ho bel-amiko! Estas ja malbon',
Char ofte vi babilis laukutime
Pri posedajho via ghranda nur."
Alia tuj rimarkis: "Por futur'
Vi metu provizejon pli proksime."*

"Ghi estas tute vana vort'."
Eldiras nun najbaro Foko:
"Ne gravas provizeja loko,
Kolerajn hundojn havu vi en kort'.
Hundidon mi volonte donus:
Anstantau ghi en akvo dronus.
Donacus prefere mi al najbar'
Por la bonfar'."
Kaj la amikoj en bonkor' ghentilaj
Lau sia povo kaj inklin'
Konsilojn multajn donis tre utilajn,
Sed en real' neniu helpis lin.

Se dum la viv' mizer' al vi impetos,
Vi provu iri al amik':
Konsilos li abunde kun logik',
Sed se pri helpo vi amikon petos,
Ektrafos lin momente en kondut'
Nur surdo kaj mirakla mut'.

KORNIKO KAJ KOKINO

*Jen kiam dum milit'
Al forto kaj insid'
De malamik' la ruzo kontraustaris
Kaj tiucele oni jam preparis
Forcedi Moskvon, — tuta loghantar'
El la chefurbo sin ekmovis
Kaj savon sian en veturo trovis,
Pro la invad' impeta de barbar'.
Tumulton tiun grandan de tegmento
Rigardas kun trankvil' kornik'.
"Kaj kiun vojon havas vi, amik'?"
Demandas nun Kokin' en veturil-
torento;
"Ja okupant' impertinenta
Trovighas tute en proksim'!"
"Chu min koncernas la afero?"
Kornik' respondas: "Tute sen
danghero
En urbo restos mi. Min fremdas via
tim'.
Kornikoj por manghad' ne taugus lau
kutim'.
Do mi kun gastoj vivos tute bone.
Kaj eble min ektrafos laubezone
Fromagho au ostet' en iu foj'.
Adiaŭ, kokulin', felicha estu voj'."*

*Kaj fakte la kornik' en urbo restis,
Sed ghi ne ghuis tute pri bonstat' —
Turmentis gastojn la mizer-malsat'
Kaj la korniko mem en supo baldau
estis.*

*Jen tiel homo blindas en praktik':
Vi sekvas al fortuno tre proksime,
Sed kiam proksimighos pli intime,
Nur trafos supon, kiel la kornik'!*

MALSHPARULO KAJ HIRUNDO

*Okazis, juna bel-sinjor',
La heredinto de havajho richa,
Malshparis ghin por la plezur'
felicha,
Kaj fine venis hor',
Ke restis el havajh' nur palto sola:
Char blovis tiam vintro en sever',
Timigis lin la frosto negh-tavola.
Jen vidas li Hirundon en aer',
Kaj oni scias bone —
Alflugas la hirund' al ni printemp-
sezone.
Do vendis li la palton lastan for.
Ghi estas en printemp' objekto sen
valor'.
Chu vesti varme sin, dum strebas tuta
tero
Al ghojo de printemp' kaj luksa bel-
vetero,
Dum fughas griza frost' al norda
region'!
Konkludo estis lau rezon'.
Forgesis tamen li pri la proverba
vero:*

*Ke unu nur hirund' ne gravas por
sezon'.*

*Kaj fakte: en subit' revenis frost'
rigora,*

*Jen knaras veturil' sur negho krak-
sonora,*

*Plenfumas kamentub' kaj vitrojn kun
grad'*

Ornamas jam glaci'.

*Pro frosto la sinjor' farighis larme-
plora,*

*Jen vidas li sur negh' kadavron de
Hirund'.*

*Frapita de chagren' ghis la anim-
profund',*

*Tremante pro malvarm', li diris en
ekzalto:*

"Sentauga bird'! Vin kaptis morta fin',

Sed multe mi plenfidis vin, —

*Kaj jen en la rezult' mizeras mi sen
palto."*

MUELISTO

*Penetris akva flu' tra digo sur rivero:
La malfelich' ne estis grand-afero,
Necesis pro difekt' nur simpla far';
Sed Muelist' ne zorgis pri ripar'.
Jen akva fluo pli kaj pli torentas
Abundas ghi potence, sen rezist'.
"Chu dormas vi, amiko Muelist'?"
Pri la afer' vi tute ne atentas."
"Ne tro dangheras flu',
Ne gravas por labor' de akvo
superflu'.
Al shtona muelil' sufichos akvo mia."
Ignoras Muelist' pri eblo de ruin',
Dum fluas sen ripoz' torento energia.
Sed baldau venis fin'.
Ekhaltis tute shton', la rado
eksilentis.
Komprenis Muelist' kaj laute li
lamentis,
Pri akva shparo nun — li zorgas en
klopod',
Esploras pri afer', sed vane post
bankrot'.
Al digo en ruin' kokinoj kelkaj venis.
"Kanajloj!" kriis li: "diablo vin
altrenis!*

*Forestas akvo jam, je mia malfortun',
Plencerte volas vi fortrinki tute nun."
Kaj shtonon jhetis li indigne por la
pun'.*

*Chu helpon donis tiu fino?
Revenis hejmen li sen akvo kaj
kokino.*

*Ekzistas en la viv'
Sinjoroj kun naiv'
(Al ili mi la fablon nun donacas), —
Mil rublojn por absurd' elspezas sen
domagh',*

*Sed pri kandela stump' avaras kun
malsagh'*

*Kaj akre en disput' kverelas kaj
malpacas,*

*Ja kvazau en mastrum' ghi estas la
trezor'.*

*Kun tia misshparem' mastrumo de
sinjor'*

Tre baldau krevos for.

OMBRO KAJ HOMO

*Ekvolis Hom' al sia ombro veni.
Al ghi proksimas li, sed ghin ne povas
teni.*

*Li kuras kun rapid', sed ne kapablas
preni,*

*Char ombro en kurad' forglitas kun
obstin',*

Ja kvazau estas ghi trezoro.

*Fin-fine post lacigh' returnis sin
sinjoro*

*Kaj vidas: ombro nun jam persekutas
lin.*

Simila estas fakt' sub nia hela suno.

*Rakonti pri afer' nun estas oportuno,
Char sama histori' rilatas al fortuno.*

*Jen vane shvitas hom' en revoj kaj
sopir'*

Por la atingo de felicho sia.

Alia hom' ne estas ambicia,

*Sed ghuste la felich', post tiu kuras
vir'.*

MUSHO KAJ VOJAGHANTOJ

*Somere, en juli', en tre varmega tago,
Sub sabla vojo, supren en zigzago,
Kun nobla famili' kaj pakajhar'
Kalesho kun chevaloj kvar*

Sin trenis.

*Tre malfacila voj' chevalojn halte
trenis,*

Kaj kondukisto por akcel',

Kun helpo de lakeo, en persisto,

Chevalojn vipis akre, kun kruel',

*Sed sen rezult'. Jen rampas el kalesh-
barel'*

Sinjoro, sinjorin', fileto, instruisto,

La shargho en kalesh' ne estis

bagatel'.

*Do kvankam la kalesh' movighis jam
denove,*

*Chevaloj trenis ghin apenau kaj
laupove,*

*Jen Musho en hazard' kaleshon
grandan vidas*

*Kaj helpi al vetur' volonte ghi
decidas.*

*Ghi zumas sen ripoz', per tuta sia
forto,*

Klopodas en ekstaz',

Jen pikas al chevala naz',
Jen sur kalesha benk' eksidas en
komforto,
Jen apud homoj flirtas ghi sen lac'
(Samkiel brokantist' sur la foira
plac'),
Kaj plendas ghi pri sia sort' malbona,
Ke ghi klopodas tute en izol',
Ke mankas jen subteno de popol',
Neniu helpas en afer' bezona.
Servistoj post kalesh' postiras sen
rapid',
Babilas instruist' al sinjorin' kun fid';
Sinjor' (kun servantin'), anstataŭ
gvid-direkto,
Foriris al arbar' por placha fung-
kolekto,
Al chiuj zumas Mush', ke tute sola
nur
Ghi zorgus plene pri vetur'.
Kaj dume la chevala kvaro
Alvenis al eben' trankvile kaj sen
baro.
"Jen", diris Mush': "finita estas faro!
Sidighu sen prokrast', veturu kun
felich'!
Kaj mi ripozos post lacigh'.
Apenau flugas mi pro strecho kaj

ekscito."
Okazas ofte homoj en la mond'
Al ajna ajh' sin trudas kun volont',
Kaj tamen por afer' forestas ech
invito.

MUSHO KAJ ABELO

*Printempe en gharden', che vent-
zefiro trema,
Sur tigo movighema
Balancis Musho sin
Kaj al Abel' sur floro
Ghi diris kun arog': "Chu plu ne tedas
vin
Dum tuta plena tag' labori kun
fervoro?
Pro tia laborem' mi mortus
senprokraste.
Al mi agrablas nur
La vivo por plezur':
Jen ofte lau kutim' mi ghoje flugas
gaste
Al luksaj baloj, al festen'.
Dirante kun sincer', en multaj richaj
domoj
Konata estas mi por plej superaj
homoj.
Kaj chie trafas mi al pompo kaj
solen'!
Ekzemple, al edzigh' au al festen'
privata
Unua venas mi por ghuo kaj regal',
Dolchajhon de la vin' mi trinkas el*

kristal'

Kaj ghuas el teler' pri mangho
delikata.

Kaj apud ajna gast'

Frandajhon prenas mi kun tre
sukcesa hast';

Virina bela seks' min ravas dolche
ankau:

Al charma' belulin' mi flirtas sen
mezur'

Kaj sidas kun plezur'

Sur rozkolora vang' au sur la shultro
blanka."

"Ghi estas bona gust' ", respondis la
Abel':

"Sed lautas ankaŭ famo,

Ke por festena bril' ne estas vi juvel',

Ke ofte trafas vin insulto kaj malamo.

Ja tute sen atent'

Forpelas oni vin kun abomena sent'."

"Chu gravas", diras Mush', "forpelo
tia?

Fenestron flugas mi, revenas tra
alia."

PARUO

*Paruo-bird' al maro venis;
Ghi entreprenis
Bruligon grandan de la mar'.
La tuta mond' tre miras pri deklar',
Kaj tremas pro terur' Neptuna akva
lando,
Alflugas birdoj en abunda grando,
Alkuras bestoj multaj por rigard',
Chu brulas jam la mar' kaj kun
kioma ard'.
Jen sub influo de rapida famo
Alvenas manghemuloj al la mar'
Por la festena eksterordinar',
En kiu fisha sup' farighus chef-
ornamo,
Pli bona ol la sup' de komercist'
gastama,
Per kiu li regas al estrar'.
Por la mirakla brul' kunvenas multaj
ili,
Starante sur la bord', senmove, en
silent',
Nur iuj flustras dum atend':
"Jen tuj ekbolos ghi! Jen brulo shajnas
brili!
Sed en realo mankis tute brul',*

*Boladon ech ne vidis la okul',
Kaj kia estis fin' de tuta entrepreno?
Kun granda hont' Paruo flugis for;
Projekto birda bruis kun furor',
Sed en efik' fiasko restis plena.*

*Dirante sen ofendo, kun sincer',
La simplan veron mi subtenas,
Ke antau la plenumo de afer'
Sin laudi ne konvenas.*

FORMIKO

*Formiko iu grandan forton havis.
En la pasint' forestis tia fort'.
Lau historia verk' Formiko tiu
gravis, —*

*Plenlevis li du grajnoj por rekord'!
Pri kuraghec' li ankau estis glora:
Okazan vermon dum atak' rigora
Li mordis akre, kun sovagh',
Kaj kontrau arane' li iris kun
kuragh'.*

*Pro tio la Formik' sur formikej-areno
Plenghuis pri la glor' multege, sen
mezur':*

*La tuta formikar' pri li parolis nur
Sed laudo en abund' egalas al veneno.
Cetere por Formik' ghi estis en
bonveno:*

*Allogis lin la glor', —
Kaj laudojn sen mezur' li strebis kun
avido*

*De sia fanfaron-humor'.
Kaj fine lin forlogis la decido
Veturi urbon por rekord',
Por glori sin per sia majstra fort'.
Do al kampul', al granda veturilo,
Alrampis ii kun malfacilo.*

*Kaj pompe venis urbon, al bazaro.
Sed kia estis frap' por lia venka sent'!
Pretendis li al glora bel-moment'
Kaj al furor' pri sia eminent'
Sed fakte la Formik' ne estis grava
varo.*

*Pri chiu hom' pli gravas propra far'.
Formiko nia kun foli' efektas,
Jen li klinighas, jen li rektas:
Neniu lin rimarkas en bazar'.
Post ekzercad' laciga, senrezulta
Chagrene diris li a! hundo, al Barbos',
Ja kiu kushis en trankvila poz':
"Konfesu ni, ke vere estas stulta
En via urbo la publik':
Nenion ghi rimarkas en praktik',
Forestas ech atent' al mia faro,
Al ekzercad' dum plena hor',
Kaj tamen kun favor'
Rekonas min la tuta formikaro."
Kaj hejmen la Formik' revenis jam
kun hont'.*

*Jen kredas ofte kun volont'
Sinjoro,
Ke oni lin admiras en la viv',
Sed lau signif'
Nur por formikoj estas lia gloro.*

KOMERCISTO

*"Andreo, mia nev',
Alvenu tuj, ekghoju pri ricev', —
Kaj onklon spertan vi imitu.
Komercu kiel mi kaj en negoc'
profitu."*

Jen, tiel en butik' parolis komercist':

*"Vi scias jam delonge pri ekzist'
De pola drapo en aparta peco, —
Malnova, putra estis ghi.*

*Lau angla ekstra drap' fiajhon vendis
mi!*

*Cent rublojn mi ricevis por afero:
Gapulon sendis Di'."*

*"Ghi estas certa fakt' " respondis nev':
"Sed kiu gapis vere dum ricev'?"
Rigardu: estas ghi centrubla
falspapero."*

Fiaskis komercist' en sia trompa ruz'.

*Sed en la mond' efikas sama uz',
Ne nur en la butik', —*

*Lau sama manier' okazas trompa
ag' —*

*Kaj chiuj volas per la ruz-atak'
Eluzi trompon por la pag'
Kaj superruzi kun efiko.*

DU KAMPULOJ

"Saluton, frat' Fadej!" "Saluton, frat' Jegor!"

"Vi kiel fartas, bon-amiko?"

"Ne scias tute vi pri malfelich-uniko. Jen Dio punis min: la domo brulis for, Kaj mizerighis mi de tiu sama hor'."

"Sed kiel? Estas ghi malbona entrepreno!"

"Jen tiel. Dum Kristnask' okazis la festeno:

Mi iris kun kandel', en nokto, al cheval'.

En kapo estis bru', pro drinko, sendispute.

Ekflamis en moment' jen pajlo en la stal',

La domo kun havajh' forbrulis tute.

Kaj vi, amik'?" — "Min punis persekute

Potenca Dio, — estas tragedi':

Jen krurojn miajn perdis mi,

Kaj pro miraklo nur mi restis viva tiam,

Mi ankau dum Kristnask' en kelon iris iam,

Kaj ankau drinkis mi tro multe da

bier'
Kun mia amikaro
Kaj por eviti brulon lau eraro,
Etingis mi kandelon pro dangher'.
Sed en mallum' — de supro ghis la
ter'
Faligis min diablo en insido.
De tiu temp' mi restas invalido."
"Pri via malfelich' vi kulpas mem",
Stefano diris kun mokem':
"Vi vane plendas kaj babilas
Pri brulo en hazard' kaj akcidenta
fal':
Por ebriul' egale malutilas
Chu helo de kandel' au de mallum'
vual'.

FOLIOJ KAJ RADIKOJ

*Dum bela tago, en somer',
Folioj densaj kun fier'
Al la zefiroj flustris kun plezuro
Pri sia verdoricha bel-naturo.
Kaj laudis sin abunde, sen mezuro:
"Chu ni ne faras arbon en real'
Tre pompa, luksa kaj 'impona?
Sen nia bel' chu arbo estus bona?
Laudindaj estas ni, sen dub'!
Dum varma tago, kiam mankas nub',
Azilon donas ni al shaf-gardist'
modesta,
Kaj logas nia dens' per sia bukla bel'
Juninojn charmajn al dancado festa,
Sub nia verda volb' vespere, en
malhel',
Trilkantas najtingal' rulade lau fabel'.
Kaj vi, zefiroj, same
Vizitas nin chiame."
"Vi povus danki ankau nin",
Humile diris voch' profunde el-sub
tero,
"Sed kiuj estas vi, achuloj en mizero?
Vi, kiuj nun sen tim'
Pretendas en konkur' al nia bel-
aspekto?"*

*Folioj grumblis kun afekto.
— "Ni estas nur",
Audighis la respondo rekta:
"Nutrantoj viaj en la ter-obskur'.
Chu ne rekonas vi pri nia ag' bezona?
Radikoj estas ni de arbo plej impona.
Vi restu en felich' lau via sort-destin',
Memoru tamen, bon-amikoj:
Printempe la natur' renaskas vin,
Sed se sekighos la radikoj,
Pereos vi kun arbo ghis la fin'."*

LUPO KAJ VULPO

*Donacas ni volonte kun plezur'
Objektojn.superfluajn nur
Klarigos tion mi per fabla bel-figur',
Char veron sub vual' preferas mi
konate.*

*"Kokajhon manghis Vulp' bongustan
kaj ghissate.
Kaj parton de proviz' kashinte ien for
Che stako kushis ghi en la vespera
hor'.
Subite kiel gast' malsata Lupo venis.
"Jen kia malfelich'!" li diris en mizer':
"Nek osto simpla ech hodiau min
subtenis.
Pro fasto kaj malsat' mi estas en
sufer'.
La hundoj de pashtist' maldormas en
koler'
Kaj tute sen rezult' mi shafojn
ekzamenis."
"Chu vere?" — "Certe, jes" — "Ho, kia
sort-atak'!
Chu manghos fojnon vi? Jen estas
granda stak'!
Mi helpos kun plezur' al via stat'*

malbona."

*Ne fojno, sed viand' — jen, estis nur
bezono,*

*Sed pri kashita mangh' forestis ech
propono.*

Al griza kavalir'

Nur sekvis bondezir'

Kaj hejmen iris li malsate, kun sopir'.

LUPO KAJ KATO

*Al la vilagho Lupo kuris,
Ne kiel gasto, sed por savi sin;
Ektimo pri la viv' tremigis lin
Kaj persekut' chasista lin teruris.
Li glitus tra pordeg' por fughi de la
strat',
Sed pro malbona sorto
Fermita estis chiu korto;
En iu lok' sur mur' ripozis en
komforto
Kun flegmo Kat'.
Jen petas Lup': "Amik', ne estu vi
rigora,
Konsilu, kiu estas plej bonkora,
Por kashi min de la minac-malbon':
Jen lautas hunda boj' kaj de kornetoj
son', —
Jam tute en proksim'!" — "Rapidu al
Stefano,
Bonkora estas li", konsilas nia Kat'.
"Mi shafon prenis for de tiu
kamparano."
"Nu provu vi al Damiano".
"Mi timas pri malbona rezultat':
De tiu hom' formanghis mi kapridon".
"Do kuru tien, al Trofim' ".*

*"En la printemp' fortrenis mi
shafidon".*

"Malbonas! Eble vin protektos Klim'!"

"Che tiu Klimo murdis mi bovidon!"

"Fiagis vi por tuta loghantar' ",

Al Lupo diris Kato;

"Chu eblas la kompat' pro tiu far'

Kaj kia sekvos rezultato?

Ne savos vin kampuloj kun amem':

En malfelich' vi kulpas mem:

Rikoltu vi lau via sem'."

LUPO KAJ MUSIDO

*Jen griza Lupo kun kruel-arog'
Fortrenis shafon al arbara lok',
Sendube ne por gasta celo.
Mizera shaf pereis en moment',
Ghin shiris Lup' per sia akra dent'
Kaj ostoj shafaj krakis sur makzelo.
Sed, malgrau avidec', ne manghis
Lup' ghis fin',
Kaj apud la restajh' kushigis sin,
Ripoze kun agrablo sata.
Sed per odor' de mangho allogata
Musid' malgranda venis en sekret',
Silente en la musko ghi rifughis.
Jen pecon de viand' ghi kaptis kaj
ekfughis
Al sia nesto, al arbet'.
Post la vizit' de nekonata gasto —
La Lupo en terur'
Ekmughis nur.
Li krias: "Rabo! Al sekur'!
Shteliston kaptu sen prokrasto!
Pereis jam entute mia richo!"*

*Okazis en la urb' simila malfelicho:
Horloghon shtelis bub' de la jughisto
Klim',*

Kaj krias la jughist': "Rabado!"

PASHTISTO

*En grego, kiun gardis Savva,
Komencis shafoj malaperi.
Ghi estas por Pashtist' afero grava.
Chu povas li similon pritoleri?
Do plendis li kaj lautis en deklar',
Ke plej terura lup' aperis en arbar',
Ke shtelas shafojn ghi, krimul' insida,
Kaj murdas ilin sen parol'.
"Rabisto vera", diras la popol':
"Indulgas kiun lup' avida?
Tre urghas kapti nun rabiston en
arbar'."
Kaj dume Savva havas en prepar'
Por chiu tag' viandon shafan bonan
(Li estis kuirist' lau sia profesii,
Pro iu kulp' pashtist' farighis li.)
Sed kiel kapti lupon, la friponon?
Jen oni serchas ghin, koleras kun
insult',
Kaj tamen sen rezult'.
Serchad' ne helpos vin: pri lupo famo
grava,
Sed manghas shafojn Savva.*

ELEFANTO-CHEFULO

*Sinjoron kun potenc',
Sed kun mizera mens',
Ne helpas bona kor', nek al bonfar'
tendenc'.*

*Ekchefis Elefant' en la arbara dens'.
Kutime Elefant' imponas per
prudento,
Sed estas, pro okaz', esceptoj en
talento.*

*Tre dika estis li
(Lau sia famili'),
Kaj tamen sen la sagho genta,
Sed kun bonkor', - li mushon ne
ofendis.*

*Jen foje al arbar', al Elefant-sinjor'
Petskribe shafoj plendis,
"Ke lupoj de shafar' la felojn prenas
for."*

*"Krimuloj sen anim'! " ekkriis la
chefulo:*

*"Chu rajtas rabi vi, friponoj sen
skrupulo?"*

*Kaj lupoj en respond': "Auskultu kun
favor'!*

*Permeson donis vi, lau via bona kor',
Por vintra vest' imposton kelkan*

preni,
Sed shaf'oj pro malsagh' ne povas
ghin kompreni.
De shaf' po unu fel' — pretendas la
impost',
Sed ili pro avar' ghin trovas
multekost'."
Resumas Elefant': "Nu, bone, por
mantel',
Singarde prenu vi po unu shafa fel',
Sed tute sen aldon', sen unu plua
flok'."

TRI KAMPULOJ

*Kampuloj tri alpashis al vilagh',
Vojaghe por noktumo ili venis.
Post urba laborad' mongajnon ili
prenis*

*Kaj nun al hejma lok' revenon
entreprenis.*

*Chu taugas dorm' malsata dum
vojagh'?*

Do petas ili pri la mangho.

*En la vilagh' malgrandas mangh-
elekt':*

*Brasika sup' en poto sen efekt',
Sur plado kach', - jen tuta mangh-
arangho.*

En granda urb' plibonas la manghad'.

Ne gravas ghi. Nur estu sata stat',

*Jen gastoj lau kutim' kun pio
krucosigna*

Eksidis por manghad' al tablo ligna.

Konjektis unu el la grup',

Ke ne sufichas por amikoj sup'.

Do li decidis artifikon uzi

*(Se mankas fort-aplik', necesas
superruzi),*

Kaj diris li: "Chu audis vi pri fam'?

Jen Fomo por milit' ekservos, certe

jam."

"Jen, kia do milit'?" — "Jen, baldau
estos ghi,
Pretendas nia regh' al china imperi'."
Komencis tiam du diskuti pri afer'
(Estante en proksirno al kulturo
Gazetojn ili legis kun plezuro).
Jen pri milit' ekighis konsider',
Kaj komencighis tuj pri politik'
diskuto,
Konjektoj saghaj kaj disputo.
Efikon bonan havis la ruzul':
Dum du disputis kaj milit-aranghis,
La tria senescepte chion manghis,
Kaj por ceteraj restis nul'.
Pri fremdaj temoj iu homo
Volonte frazas en diskut' —
Pri hinda sorto kaj kondut'
Parolas li tre klare, sen balbut'.
Sed senantente, dum disput',
Forbrulas lia propra domo.

FLOROJ

*En richa domo, sur fenestra breto
En pitoreska poto kun valor'
Kaj en proksimo al natura flor'
Jen floro arta tute sen diskreto
Balancis sin kun glor-fiero
Kaj kun arog' pri sia bel-supero.
Malgranda pluv' ekgutis en subit',
Kaj floro silka petas Jupiteron,
Ke ne akvumu li la teron:
De tiu pluv' nur estas malprofit'.
"Ho, justa Dio", preghas arta floro:
"Chu estas ja valoro
En tiu pluv' kaj kia rezultat'?
Rigardu kun favoro:
Plenkota estos nia strat'."
Sed peton stultan Zeuso ne atentas.
Somera pluvo kun rapid' torentas.
Kaj plu varmego homojn ne
turmentas.
Viglihas jam natur'
Kaj chiu vegetajh' plenfreshas por
plezur'
Sur la fenestra bret' natura charma
floro
Plenighis jam per sia bel'
Kaj kvazau de miel'*

*Aromas bon-odoro.
Sed falsa flor' pro vigla pluva fort'
Senighis de belec' kaj lau severa sort'
Ghi trafis al forjhetā korb'.*

*Talenta hom' kritikon ne koleras,
Ne povas ghi difekti al belec'.
Nur flor' de falsa spec'
En pluv' mizeras.*

LUPOJ KAJ SHAFOJ

*Pro Lupoj al Shafar' malbona vivo
venis*

*(Ne tro ghentilas Lupo per makzel'),
Kaj besta registar' defendon
entreprenis,*

Por savi Shafojn de kruel' —

Fondighis Komitat' por tiu cel'.

*Hazarde trafis ghin el Lupoj granda
grupo,*

*Sendube, ke krimul' ne estas chiu
Lupo,*

Ekzistas ankau Lup' de paca spec'

(Kaj estas tiu fakt' al mi konata),

Trairis li en shafa proksimec'

*Trankvile, sen atent', - estante tute
sata.*

Do kial mankus Lup' en Komitat'?

*La Shafoj en mizer' meritas pri
kompat',*

Sed ankau por la Lup' egalulo bonrilat'.

*Jen en arbara lok' malfermis sin
kunsido.*

*Post longa diskutad', paroloj pri
decido,*

*Verkita estis legh', projekto por
dekret'.*

*Jen estas ghi, la legho en komplet':
"Tuj kiam Lup' maljuston
entreprenos
Kaj kun ofend' al Shafo venos,
La Shafo rajtas sen prokrast'
La Lupon kapti kaj en hast'
Al tribunalo Lupon treni,
Por povu tribunal' aferon interveni."
Perfekta estas legh-ordon',
Minacas pun' al Lup-fripon'.
La nova legh' rabiston ne subtenas,
Efikas nun de Shaf' mizera plend'.
Sed Lupoj al mizer' rilatas sen atent'
kaj Shafojn lau malnov' por sia
mangho trenas.*

AVARULO

*Trezoron grandan gardis la Spirit'.
Sed venis foje, en subit',
De la Satan' ordon-komando:
Forflugi por afer' al malproksima
lando.*

*Por la Spirit' sen plua pens-medit'
Necesas la plenumo de ordono,
Domaghas tamen la Demonon,
Konfuzas lin la sorto de trezor', —
Prizorgos kiu pri la or'?
Chu trovos li gardistojn lau bezono?
Sed por gardad' necesas granda
mono.*

*Restigi sen la gard' — ghi estas risko
nur:*

*Honesto en la viv' funkcias ja
mensoge.*

*Prishtelas homoj ofte kun plezur',
Atingi monon estas tre alloge.
Klopodas, pensas li kaj pretas jam
decid':*

*Avara homo helpas al Spirit'.
Li venis kun trezor' al tiu Avarulo
Kaj diris li: "Auskultu min, sinjor'!
Forflugi devas mi lau urgha serv-
postulo,*

Al via mosht' inklinas mia kor, —
Do por memor', kun tre anima sento,
Donacas mi trezoron kun volont'.
Elspezu ghin kraj ghuu en kontento
Sen zorgo pri estont'.
Kaj en futur', post via morta fin',
Lauleghe mi heredos vin, —
Jen estas tuta la kondicho.
Kaj dume kun plezur' vi vivu en
felicho!"
Foriris li, — kaj pasis dudekjar'.
Post la plenumo de ofica far'
Trans kampoj kaj arbar'
Spirito flugas hejmen kaj
konstatas, —
Ho, kia ghajo! Mortis en honest'
La Avarul' malsata sur la kest',
Dukatoj chiu tamen bone statas.
Jen la Spirit' Trezoron sian prenis
Kaj ghojis al profit':
Senpage la gardist' oficon sian tenis.

Se avarul' avaras pli kaj pli,
Nur por demon' dukatojn gardas li.

PASHTISTO KAJ KULO

*Pashtisto dormis dolche dum ripoz'.
Al tiu sama lok' serpent' en furioz'
Alrampis kun pikil' venena,
Kun la minac' pri morto abomena.
Averte pro kompat' ekpikis lerta Kul'
Per tuta forto al dormul'.
Pashtisto dum vekigh' serpenton
batis morte,
Sed en la sama temp' li frapis Kulon
forte,
Kaj la mizera Kul' pereis senrevene.*

*Ekzistas en la mond', similaj faktoj
plene:
Se homo kun malfort' al granda
potencul'
Ekprovas veron ekriveli,
Kapablas li pereon nur akceli
Samkiel nia kul'.*

POTO KAJ KALDRONO

*Jen Poto al Kaldron' farighis
kamarad'.
Superas la Kaldron' per sia nobla
stat',
Sed por amika sent' ghi estas
bagatelo.
Do Poto kun Kaldron' amikas lau
fidelo.
Neeblas nun disigh' por tiu ama par'.
De frumaten' ghis nokt' konsente ili
kunas,
Sur fajre-flama forn' en amikeco
komunas;
Je chiu pash' duopas amikar'
En plena solidar'.
Ekvolis la Kaldron' tra mondo rond-
veturi,
Alvokas li la Poton al vojagh', —
Kaj Poto al Kaldron' alighis kun
kuragh':
En sama veturil' li volas plenplezuri.
Jen sur pavima shton' en trema
maltrankvil'
Sin pushas amikar' en sia veturil'.
Kavetoj en abund', de malglataj'h'
difekto*

*Malgravas al Kaldron', se frapas la
efekto*

*De la malbona voj' al Poto en terur'.
Ne volas tamen Pot' rifuzi pri vetur';
Argila nia Pot' fieras kun plezur',
Estante al Kaldron' amiko
akompana.*

*Chu longis promenad' dum tiu kur'?'
Ne scias mi. Sed post vojagh'
lauplana*

*Fortulo la Kaldron' revenis tute sana,
Kaj de la Pot' — frakasaj pecoj nur.
De tiu chi rakont' vidighas la moralo:
En am' kaj amikec' tre gravas plen-
egalo.*

ENTERIGO

*Ekzistis la kutimo en Egipto, —
Dum enteriga pompa procesi'
Lamentis ploristin' kun lauta kri'.
Jen foje dum marshad' al kripto
Dungitaj ploristinoj kun grimac'
Lamentis en funebra grandiozo
Sekvante homon richan al ripozo,
Al loko de eterna pac'.
Pasanton iun kaptis la supozo,
Ke la malghoj' profundas kun sincer'
Kaj diris li: "Lau mia profesio
Jen revivigh' okazas per magio.
Sorchisto eslas mi, kapabla per
mister'
Mortinton fari vivoplena.
Akceptu vi miraklon por konsol'."
"Ho, patro nia! Estu via vol'!
Sed pefas ni pri la favor' subtena,
Ke post la tagoj kvin
Forprenu mort' denove lin.
Sentaugis li dum estis viva, —
Vivante ne utilos li;
Sed lau funebra tradici'
Redungos oni nin al ploro kolektiva."*

Sentaugas ofte la richul'-sinjor',

En lia morto estas nur valor'.

VULPO KAJ AZENO

*"De kie venas vi, saghul-sinjor'?"
Demandis Vulpo al Azeno.
"Jhus vidis mi Leonon en dolor':
Mizeras multe Suvereno.
En la pasint' tondregis lia blek', —
Kaj flugis mi rapide pro timeg'
Savante min de la terura krio,
Sed nun malsanas kaj kadukas li,
Senfortas pli kaj pli, —
Kaj estas tute for pasinta trema tim',
Kaverne kushas li, forpasis energio.
Kaj pasis sen reven' respekto kaj
estim',
Elpagas chiu best' la shuldojn kun
procento!
Irrante preter li, ja chiu venghas
Lau frapa pun', —
Per korno au per dento..."
"Sed certe ja konfuz' retenis vin,
De tiu frap' al fama suvereno? "
"Ho, kial do? Neniu estu ghenoj!
Chu timos mi sen kaux'? Mi ankau
frapis lin
Ekkonu jam Leon' la hufojn de
Azeno!"*

*Kanajloj apud vi, se vi potencas nur,
Ne riskas tushi vin per sia ech
pretendo;
Sed se defalos vi de gloro al obskur',
Do frapos multe vin aflikto kaj
ofendo.*

KALUMNIULO KAJ SERPENTO

*Vi vane dirus, ke diabloj tute
Ignoras la justecon absolute.
Ne, konas mi ekzemplojn pri afer'.
Okazis foje en infer',
Dum marsh' parada sub la ter',
Kalumniulo kun Serpent' kverelis,
Unuan lokon en marsheto celis.
Estighis tiam bruo kaj tumult',
Pretendis ambau kun insult'
Pri sia malutil', supera lau rezult'.
Kaj en disput' pri sia malutilo
Kalumniulo en kverel-ekstrem'
La langon montris kun mokem'.
Responde la Serpent' minacis per
pikilo
Kaj siblis ghi proteste al ofend'.
Unuan lokon strebis la Serpent', —
Kaj baldau al Serpent' la homo cedis
Sed ne konsentis tion la Satan',
Li intervenis mem al bruo kaj chikan'.
La homan rajton la Satano pledis,
Dirinte al Serpent':
Meritas vi per via akra dent',
Sed tamen hom' superas en talent'.
Per la pikil' pereon vi minacas,
Dangheras vi sendube en proksim',*

*Perfidan frapon ofte vi audacas, —
Sed multe pli dangheras al viktim'
La kalumni' per sia fush-esprim',
Char kontrau ghi defendas nek
montaro,
Nek largha maro!
Superas hom' en malutil-talent'.
Do sekvu lin, — humile, en silent'.
Triumfis Kalumni' per sia eminent'.*

AGLO KAJ KOKINOJ

*Supere, kun admir' pri largha
horizonto,
Jen Aglo shvebis alte kun fier'
Tre fore de la ter',
En nuboj, apud fulmofonto.
Kaj post la nuba grandioz'
Sidighis birda Regh' grenejon por
ripoz'.
Por Aglo estas ghi mizera loko,
Sed por la Regh' ne gravas la
shablon'.
Li sur grenejon flugis kun impon',
Vershajne pro forest' en tiu region'
De kverko au granita roko.
Kaj lau kapric', post kelkminuta rest'
Li flugis kun majest'
Al la grenej' alia por cheest'.
Vidinte ghin kokin' al amikino
Rezonas tiel kun afekt':
"Sed kial Agloj ghuas pri respekt'?
Chu per flugada nur inklino?
Nu, certe, sen babil',
Al la grenej' mi flugus kun facil'.
Do ni ne estu stultaj laukutime.
Pretendas Agloj vane je fier':
Forestas en natur' por ili la prefer';*

*Vi vidas, — apud ter'
Flugadas ili, kiel ni, proksime."
La Aglo al babel' respondas kun
malshat':
"Eraras vi en via rezonad';
La Agloj, lau kapric', direktas sin al
subo,
Sed por kokina gent' ne eblas flug' al
nubo!»*

*Kritik-jughante pri talent'
Malbonajn trajtojn vi ne trovu,
Nur pri belec' admiri vi ekprovu,
Pri la divers-nivel' de ghia eminent'.*

BALAILO

*Malpura Balail' alvenis al honor':
Nun ghi por simpla plank' ne servas
kun fervor',
Ghi zorgas jam pri vesto de sinjoro
(Drinkulo la servist' eraris dum
laboro).*

*Jen agas Balail' aktive, sen ripoz',
Sinjoran veston jam senlace batas
Kaj kvazau dum drashad' vestajhon
senkompatas.*

*Laboras ghi kun certa grandioz'.
Sed malgrau aktivec' bedaure ghi
malpuras,
Forestas bon-rezult' de tiu Balail':
Ju pli fervoras ghi, des pli makuloj
pluras.*

*Tutsama estas malutil'
En la simil':
Jen vigla sensciul' sintrude lecionas
Kaj al scienc-labor' korektojn siajn
donas.*

PARNASO

*Post kiam Greka land' forpelis diojn
for*

*Kaj oni en sukces' disdonis teron
sanktan,*

*Al fama lok' Parnas' alvenis mastro
ankau.*

*Azenojn sur Parnas' jam pashtas la
sinjor'.*

*Kaj tiu Azenar' la fakton konis,
Ke Muzoj sur Parnas' en kant'
agrable sonis.*

Do ili diris: "Al Parnas'

Ne vane ni alvenis en amas';

*Al mondo tedis jam plezuroj de la
Muzoj.*

*Agrablos por la mond' Azen-amuzoj."
Jen unu lautas kvazau por instru':*

"Ekkantos mi kaj vi daurigu plu!

Kaj sen konfuz' forjhetu timon egan!

Ni gloru nian forton gregan,

Kaj pli ol Muza kanta rond',

*En strebo al muzik' ni kantos por la
mond'!*

Kaj al triumf' de nia entrepreno,

Por ke ne estu ajna embaras',

Decidu ni: sen vocho de azeno

Neniun ni akceptu al Parnas'."
Aprobis Azenar' azenan
Parolon bel-sagacan kaj konvenan, —
Kaj nova kantistar' kantachis sen
ghentil',
Ja kvazau knaris veturil'
Kun neshmiritaj radoj mil.
Sed kia estis fin' de tiu bruo kanta?
Ektedis al sinjor' la hhoru muzikanta
Kaj brutojn de Parnas' forpelis li al
stal'.
Al malsaghul' mi diros kun moral'
Per vortoj de proverb' konstanta:
Se kap' malplenas kiel trog',
Ne helpos ghin ech bona lok'.

RAZILO

*Okaze, dum vojagh' renkontis mi
konaton,
En la gastej' kun li noktumis mi.
Matene vekas min tre stranga kri', —
Ektrafis la amik' mizeran staton.
Vespere estis shercoj kaj amuz', —
Sed nun li ghemas en konfuz',
Sopiras li kaj plendas kun obtuz'.
"Amiko kara! Kio do okazas?
Chu sanas vi?" — "Nenio, mi min
razas."
"Nenio pli?" Mi vidas — la amik'
Che la spegul' kun abomen' grimacas,
Ja kvazau la razil' al lia haut'
minacas.
Konjektas mi la kauzon de panik'.
"Vi vane vin turmentas, Rigardu kun
trankvil':
Ne estas ghi por raz', sed por lignajh'
tranchil'.
Pro tiu malakrajh' torturon vi nur
sentas."
"Vi pravas, kamarad', Razil' malbona
estas!
Ghi estas vera vort', kaj tion mi
atestas.*

*Sed akro de razil' dangheras en
tranchad'."*

*"Ho, mi asertas ja plencerte, kun
insisto:*

*Malakra razilach' vin vundos en
difekt',*

*Dum akra instrument' vin razos kun
perfekt',*

Scipovu nur la arton de razisto."

Klarigos mi la sencon de rakonto:

Sinjoro sen talento

Tre timas homojn kun prudento

Kaj malsaghulojn shatas kun volont'.

MUSOJ

"Jen kia malfelich', fratin'!"
Sur shipo laute Muso diris:
"En holdo akvo levis sin,
Tra iu truo ghi eniris:
Jam ghis makzelo ghi aliris.
(Sed fakte al pied' nur akvo iris).
Do mi konkludas sen chikan':
Ebria estas kapitan'
Kaj shipanar' ne zorgas pri sekuro,
Forestas ordo en veturo.
Jhus vokis mi al tuta la popol',
Ke nia shipo dronas sen kontrol',
Sed mankas ech atento al parol',
Ja kvazau mi sciigis nur mensogon.
Sed oni vidu kun esplor', —
Pereos ship' post unu hor'.
Chu ni pretendos tiun epilogon?
De shipo saltu ni rapide pro dangher',
Proksimas, certe, ter'!"
Kaj ambau saltis tuj sen penso kaj
prudento
Kaj dronis en momento.
Sed en konduk' de sperta kapitan'
Atingis al haven' la ship' lau sia plan'.

Aperas nun demando:

*Kaj truo mem? Kaj manko de
komando?
Sed truo estis tre malgranda,
Shtopita tuj en kreva lok',
Kaj la cetero — nur mensog'.*

SCIURO

*Servadis kun fidelo
Sciuro al Leon'. Kaj estis famo ech,
Ke servo de Sciur' agrablis al la regh'.
Agrabli al Leon' ne estas bagatelo.
Da nuksoj granda char' — jen pago
lau promes'.
Bonegas la promes', sed temp' rapide
pasas,
Kaj ofte jam malsat' Sciuron
embarasas;
Kaj ofte la Sciur' larmetas dum
komplez';
Rigardas ofte ghi al verda brancha
alto;
Jen saltas en altec' amikoj kun
plezur',
Krankante sen ripoz' nuksetojn
frandas nur,
En ghuo kaj felich' amuzas sin per
salto.
Sed veni al nuksuj' ne riskas la Sciur';
Ghin tenas la ofic' per sia forta
shnur',
En ghia strech-labor' forestas tute
halto.
Sed tedis al Sciur' la servo kun*

*fervor',
Maljuna estas ghi, ne taugas por
labor',
Rezultas nun eksigh' lau regha skrib-
ordono.
Da nuksoj granda char' alvenis en
aldono.
Bonegas la donac' de regha eminent'!
Verdire, estas ghi por mangho
granda lukso.
Nur sola malbonajh': por mangh' de
bela nukso
En busho de Sciur' neniu restis dent'.*

FESTENO

*Por la konsolo en malsata jar'
Aranghis regh' Leon' festenon por
bestar'.*

*Jen kurieroj vokas en amaso
Al regha fest':*

Ke venu chiu best'

De granda kaj malgranda raso.

Kaj multaj lau invit' alvenis al Leon'.

*Chu eblas la rifuz' al bona mangh-
propon'.*

Des pli dum jar' malgrasa?

*Jen Talpo, Vulp', Marmot' sin trenis al
festen'.*

Sed ili iom malfruighis,

*Dum gastoj al festen' che tabloj jam
sidighis.*

Amiko Vulpo de maten'

Klopodis multon sen sistem',

Marmoto longe sin ornamis,

Kaj Talpo dum la vojo lamis.

*Ne plachas tamen de stomak'
malplen'.*

*Jen apud regh' Leon' vidighas lok'
libera, —*

*Kaj oni strebas ghin, al tiu lok'
prospera.*

"Amikoj karaj!" diras jam Panter':
"Tre bonas tiu lok', sed fremdas por
afer':

Al Elefant' ghi estas destinita, —
Minacas vin dispremo plej subita,
Do jen,
Se vi ne logas de stomak' malplen',
Vi staru apud pordo —
Kaj manghu en konkordo.
Sed lokojn en unua vic'
Destinis oni al personoj dikaj;
Kaj se vi estas tro kritikaj,
Sidighu hejme kun kapric'."

KAMPARANO KAJ RABISTO

*En zorgo pri mastrum' malricha
Kamparan'
Achetis dum foir' bovinon kun
sitelo, —
Kaj lau returna voj', arbare en
malhelo,
Li iris kun bovin' en akompan'.
Subite la Kampul' ektrafis al Rabisto.
Krimulo sen indulg' prirabis tute lin.
"Ho, kia malfelich'! Mi estas en ruin'!
Malbona mia sort' min frapis ghis la
fin'!
Kolektis monon mi dum jaro kun
persisto,
Ke venu por achet' plej bela mia tag'."
"Ne plendu tute vi maljuston de atak'
"
Replikis la Rabist' lamenton lian
bruan:
"Bovinon en mastrum' ne melkos
certe mi:
Do lau rezon' — reprenu vi
Sitelon superfluan."*

HUNDO KAJ CHEVALO

*Okazis foje, Hundo kaj Cheval'
Pri rolo en mastrum' disputon havis.
"Jen", diris Hund': "Sinjor' en granda
skal'!*

*Per kia ag' vi en vilagh' ekgravis, —
Per veturig' au per plugad' de ter'?
Valoron kian havas la afer'?
Kun mi konkuri, certe, vi ne povas.
Dum tag' kaj nokt' ripozon mi ne
trovas:*

*La gregon mi observas dum la tag'
Kaj nokte — hejmon gardas mi en
vag', "*

*Cheval' respondis: "Senkonteste
Vi tute pravas en parol',
Sed, se ne plugus mi honeste,
Nenion gardus vi en via rol'."*

VULPO

*Matene sur glaci', el truo traborita,
Jen Vulpo trinkis dum grandega
frost'.*

*Chu pro destin' au pro hazard' subita
La vosto de la Vulp' farighis
akvumita;*

*Do al frostighis al glad' la vost'.
Ne grandas malfelich', facilas la
korekto:*

*Necesas strech' — ioma kaj sen fort';
Nur kelkaj haroj mankus en difekto,
Kaj lau felicha sort'
Forkurus mia Vulp' en plej bonega
ord'*

*Sed fushi al la vost'? Al vosto tre
valora,*

Kun bela kresko, orkolora?

*Plibonas la atend', - la homoj dormas
nun,*

*Kaj eble jam degel' okazos pro la
sun'.*

*Atendas vane ghi, la vost' frostighas
plue.*

*Alvenas hela tag' farighas jam
malfrue —*

Jen homoj iras nun kaj rekte al

rivero.

La Vulpo en mizero

Penege strechas sin,

*Sed la glacia fort' tre firme tenas
ghin.*

*Okaze kuras Lup'. "Amiko plej
supera!*

*Vi helpu sen prokrast'. Jen venas mia
fin'!"*

La Lupo tuj alvenis

Kaj savon entreprenis.

Tre simpla estis lia far':

Formordis li la voston sen prepar',

*Kaj Vulpo kuris for sen vost', en fi-
aspekto.*

*Felicha, ke la fel' postrestis sen
difekto.*

Tre komprenebla estas la fabel':

*Se ne domaghus Vulp' pri hara
bagatel',*

*Ne perdus voston ghi en savo de
kruel'.*

LEONO KAJ MUSO

*Ekpetis Mus' humile al Leono.
Permeson loghi nun en lia regiono.
Petante diris ghi: "Ja kvankam en
arbar'
Potencas vi kun lauta gloro,
Neniu vin egalas en teroro,
Kaj kvankam via mugh' ne estas
ordinar',
Sed kiu scias pri estonta vivo?
Rezulton kian havos efektivo?
Malgrandas tute mi,
Sed, eble, lau neces' utilos mi al vi,"
Ekkriis la Leon': "Mizer-malgranda
besto!
Maldeca arrogant'!
Meritas morton vi pro via
senmodesto.
Forkuru tute for de mia regha land',
Au mi dispremos vin sen longa
proceduro."
Malgranda nia Mus' kun timo kaj
teruro
Forkuris en rapid' al fora
malproksim'.
Sed frapis al Leon' la vengh' pro
malhumilo.*

*Serchante pri tagmangh', li vagis lau
kutim',
Subite trafis li al reto de kaptilo.
Li strebas sen rezult' kaj mughas kun
sovagh',
Kun strecho kaj rezist' nur vane li
protestas.
En reto lau perfid' li senelire
restas, —
Kaj por publik-amuz' li sidas jam en
kagh';
Nun rememoras li maldolche, kun
domagh',
Ke povus, certe, Mus' necesan helpon
fari,
Forkuron el kaptil' per akra dent'
prepari,
Kaj pro fiera stult' li devas pentofari.*

*Leganto, shatas veron mi, —
Kaj jen aldon' al fabla ironi':
Ne vane la popol' esprimas kun
rezono, —
Ne krachu puton, — lau bezono
Vi havos akvon por dispono.*

FALKO KAJ VERMO

*Alkrochis Vermo sin sur iu alta
branch'*

*Malgranda Verm' balancis sin
mizere, —*

*Kaj Falko en flugad' pri tiu kroch-
arangh'*

Primokas laute kaj fiere:

"Penege vanas vi rampante al zenit'!

Chu vi en via lok' pretendas al profit'?

Por vi forestas nun libero

*Kaj vi en via stat' dependas de
vetero."*

"Vi shercas kun facil' "

*Respondas Verm': "char helpe de
flugil'*

Vi flugas alte, sen depend'.

Sed per alio dotis min la sorto

Kaj en alio estas mia forto;

Por mi en krocho gravas la talent'."

KAMPARANO KAJ VULPO

*"Chu estas bona la inklin'
Por shtel-kaptado de kokin'?"
Demandis Kamparan' al Vulpo dum
renkonto:*

*"Chu vin ne tushas honto?
Mi diras simple, sen sekret', —
En via profesi' en via shtel-ripet'
Forestas ombro ech de la konduto
bona.*

*Ghi estas peko, maldecajh' fripona,
Insultas vin la tuta mond',
Kaj chiutage sen volont'
Vi sentas timon pri estont', —
En birda kort' forlasi vian felon!
Chu plachas vin provoki mort-
kruelon?"*

*"Jes mia viv' ne estas por plezur' ",
Respondis Vulpo pente:*

*"De chiu flank' — suferas mi
turmente,
Shtelita mangh' min nauzas nur.
Verdire, mi honestas lau natur'!
Sed kion fari? Viv-bezono!
Kaj krome, mia amikul',
Ghi estas en la mond' regul', —
Ne sola mi imitas al fripono.*

Jes, mia profesi' ne dolchas lau afer', "
Kampul' rimarkis kun sincer':
"Se via diro estas ver', —
De via pek' mi savon donos
Honestan panon mi proponos.
En mia birda kort' farighu vi gardist',
Kaj kontraŭ fremda vulp' defendu
kun persist'.

Kompense en la viv' nenion vi
bezonos,
Pri ajna agrablajh' senmanke vi
disponos."

Post tiu bel-propon' farighis la
kontrakt',
Komencis nia Vulp' gardadon kun
ekzakt'.

Al Vulpo venis jam la viv' alloga,
glata:
Mastrumo — en richec', la vivo estas
sata,
La viv' farighis fest',
Grasighis nia best'.

Sed mankas la stimul' por vivo en
honest',
La neshtelita mangh' ne plachas al
ruzul',
Kaj venis por honest' finiĝo tre
malbona:

*En nokta nigra hor' la Vulpo plej
fripona
Kokinojn de Kampul' ekstermis ghis
la nul'.*

*La hom' honesta kun skrupul'
Ech malgrau viv' de mizerul'
Aferon shtelan preterpasas;
Sed la fripono, ech richul', Shteladon
tute ne forlasas.*

LEGOMISTO KAJ FILOZOFO

*Printempe, Legomist' fosadis en
ghardeno,
Ja kvazau en la ter' trovighis bel-
trezor'.
Laboris li ghis nokt' de fru-mateno,
Persiste kun fervor', —
Kaj plantis li kukumojn dum labor'.
En najbarec' loghadis amatoro
De la gharden-kultur' —
Pedanto-filozof', tre granda oratoro,
Amiko de natur'.
Babilis multe li pri la gharden-
laboro, —
Kaj lau scienco kun raci'
Kukumojn planti ankau volis li.
En fanfaron' li mokas al najbaro:
"Vi shvitas vane, mia frat'.
Jen mi post mia laborad'
Superos multe vin, mi diras sen
eraro.
Gharden' mizera via de legom'
Dezertos tute — estas aksiom'.
Verdire, mi tre miras,
Ke via ghardenach' pretendas al
prosper'.
De kie vi prosperon nun akiras?*

*Chu al scienc' necesa vi aspiras?"
"Forestas temp' por la scienc-afer'.
Jen sperto mia, ankau laboremo, —
Por mi sufichas la problemo, —
Do ili nutras min sur mia ter'."*

*"Obskura hom'! Chu vi sciencojn
spitus?"*

*"Vi ne kulpigu min, sinjoro, sen
rezon'.
Volonte mi imitus
Al via bel-propon',
Sed jughu mem, somero jam alvenas.
Kaj dume vi, sinjor', senzorge nur
promenas.*

*Por la sezon' jam multon plantis mi.
Kaj kie estas via bed-lini'?"*

*"Mi tre domaghas pro la tempo-
manko,*

*Mi studas nur
Kaj legas sen mezur',
Chu fosi per fosil' au per plugilo
ankau,*

*Sed tamen restas temp' suficha por
semad'."*

*"Por mi ne estas ghi en sama grad',"
Respondis Legomist' kaj tuj foriris
Kun la fosil'.*

Al Filozof' flnighis la babil',

*En sia hejmo studis li kaj miris,
Klopodis li en libroj kaj sur ter',
La tagoj tutaj dronis en afer'.
Kaj la rezulto jam ne vantas, —
Komencis io kreski sur la bed';
Subite en revu' aperis novajhet',
Li chion shanghas kaj transplantas
Lau nova formo kaj fason'.
Sed kia estis fin' al fanfaron'?
La Legomist' rikolton richan havis,
Enspezis fruktojn li kaj bone bravus.
Sed al pedant-saghul'
Rezulto estis nul'.*

BUBO KAJ VERMO

*Ne trovos vi felichon en perfid'!
Malgajnas perfidul' en sia fi-oflco.
Li perdas kun facil' la kredon de
konfid'
Kaj trafas lin mizer', en la unua vico.
Kampulon petis Verm' humile, kun
modest',
Allasi al gharden' por vivi en honest'.
Li vivos tie, certe, laŭ konveno.
Ne tushos fruktojn li, — manghetos
nur
Foliojn, kelkajn flavajn laŭ natur'.
Rezonas la Kampul': "Ne estas ghi
terur',
Libera lok' sufichas en ghardeno;
Do vivu Vermo en trankvil'.
Chu povas esti malprofito grava
Pro iu folieto flava?"
Permesis li kaj Vermo kun facil'
Sur brancho trovis spacon por azil'.
Ghi vivas tie tute senmizere,
Kaj tamen tre modere.
La bela Suno-Reg'h' origas fruktojn
jam;
La fruktoj en gharden' por la okul'
plezuris;*

Jen pomo ronda, rugha kiel flam',
Sur brancho pendas kaj maturas.
Allogas Bubon ghi per sia placha bel'.
La pomo luksas kvazau bel-juvel',
Sed malproksima estas cel':
Sur arbon rampi Bubo ne kuraghas,
Por skui ghin — li ne sufiche
aghas, —
Ne scias li rimedojn en shtelad'.
Subite por afer' aperis kamarad'.
Ghi estis simpla Verm' kaj diras ghi
al Bubo:
"Pereos tiu pomp', neniŭ estas dubo;
Rikoltos la Kampul' la fruktojn ghis
vesper'.
Mi tamen helpos vin volonte, kun
sincer'.
Malgrandan pagon donu por afer':
Dekoblon prenu vi, por mi sufichos
Parteto nur, — kaj plene mi felichos.
Dum tuta mia viv' mi manghas kun
moder'."
Konsentis Bubo al amik-propono,
Komencis Vermo helpi laŭ bezono.
Momente segis ghi la pomon for.
Sed kion Verm' ricevis por labor'?
Apenau pomo falis sen-detene,
La Bubo manghis ghin entute, kun

*rapid',
Kaj kiam Verm' alrampis por profit',
Dispremis Bubo ghin sen zorgo kaj
medit', —
Kaj Vermo kun la pom' pereis
senrevene.*

MALRICHA RICHULO

*"Richulo restas tute sen felich',
Se mankas mangho en sufich',
Dum li avaras monon por la rich'.
Ghi estas stulto, — chiam prenas
morto.
Ni nur turmentas nin per tiu sorto.
Ne, se farighus mi richul',
Elspezus monon mi facile, sen
skrupul',
La vivon kun plezur', kun lukso mi
aranghus,
En bruo de festen' mi kun amikoj
manghus,
Bonfarus mi al homoj kun volont'.
Sed richa avarul' vegetas en sufero."
Jen tiel Malrichul' meditis pri estont',
En sia hejmo, en mizero.
Subite tra fendet' aperis nekonat'.
Chu estis li sorchist' au por diablo
frat',
Ne scias mi; vershajne la diablo.
Por la rakonto estas ghi probable.
Do diris li: "Per richa plen-efik'
Plezure mi kompleksos al amik'.
Jen estas la monuj': dukaton ghi
enhavas.*

*Se vi elprenos ghin, alia venos tuj.
Miraklas la monuj',
Kaj, certe, vi, amik', en la richeco
bravos.*

*Do prenu ghin kaj uzu por felich', —
Lau via volo, sendiskute.*

*Sed estas tamen unu nur kondich':
Elspezi monon vi ne rajtas tute
Ghis la monuj' ne dronos en river'."
Post tiu fraz' li flugis al infer'.*

*Konsternon sentis nia Malrichulo.
Jen kaptas li monujon por kalkulo.
Chu songhas li, chu estas ghi real'?
Elprenas li dukaton kun lojal',
Sed en monuj' dukat' alia brilas.
"Ho, kia plenfelich'! La Mizerul'
jubilas,*

Kaj li resumas en ekscit':

*"Hodiau prenos mi la monon sen
kalkulo,*

*Kaj morgau jam farighos mi richulo,
Ekvivos lukse, kvazau sibirit'."*

*Sed en maten' alion li pripensas:
"Richulo ghusta estas mi,*

Felichon certan donas la premi'!

Sed al duoblo veni mi intencas.

Chu por richeco mankos la fervor'?

Por unu tag' necesas nur labor'!

*Jen mono por kalesh', por domo
duetagma,*

*Nur por bieno.mankas la trezor'.
Chu belan shancon perdos mi,
malsagha?*

*Retenos mi monujon dum la tag';
Dum sola tag' mi vivos en malricho,
Kaj poste min favoros la.felicho."
Sed pasas tag', semajno kaj
monat', —*

*Persistas Malrichul' en sia laborad',
Kaj dume vivas li mizere, en malsat'.
Dum tuta tag' laboras li kun peno,
Kaj en vesper' li pensas en chagreno,
Ke mankas mon' por lia bona stat'.
Dronigi jam monujon li intencas,
Sed kun dolor' la koro kondolencas,
Ne riskas li alveni al river'.*

*"Chu povas mi rifuzi pri afer',
Dum oro flava fluas kaj potencas?"
En Malrichul' malviglas plene sang',
Maldikas li pro tuta mangho-mank'
Kaj kiel oro flavas lia vang'.
Pri luksa viv' ne revas li ekscese.
Lin ekposedis tute la malsan',
Kaj per tremanta man'
Dukatojn tiras li senchese.
Sed kia estis fin' al homo en chifon'?*

*En sama hejm', sur sama benko fera,
Pro ftizo mortis li, mizera,
En la kalkul' de naua milion'.*

HUNDO KAJ KAMPULO

*Kampulo unu tre shparema,
Sufiche richa kaj ordema,
Invitis Hundon por gardad',
Por pan-bakad'
Kaj krome por gharden-laboro.
"Ho, tio estas ja malver'! "
Leganto diros: "Trompas la auroro
Sen tuta honto kaj honoro.
Gardado estas hund-af'er',
Sed chu la hundo bakas panon
Au plantas en gharden' rafanon?"
Leganto! Certe pravas vi,
Sed nur alion celas mi.
Do nia Hund' konsentis pri kondicho
Kaj pri salajro en triobla kvant'!
Jen la Kampulo, tute en felicho,
Sin movis al forir' — sed post vetur'
Lin frapis nur terur'.
Koleras li kaj ghemas en chagreno.
Legom' sekighis plene en ghardeno,
Forestas pano, kaj al kort'
Shtelistoj venis kun perfort'.
Insultas li la Hundon plej malbone,
Sed nia Hund' pravigas sin rezone:
Malhelpis al bakad' gharden-labor',
Legomojn ghi ne zorgis tute,*

*Char garda serv' lacigis absolute;
Kaj la friponoj shtelis al sinjor',
Char estis pan-bakad' en tiu hor'.*

AZENO KAJ KAMPULO

*Al gardo de legom-gharden'
Dungita estis best' Azen', —
Por la minaco al paseroj.
Azeno, la bravul', honestis en aferoj:
Ne estis li shtelisto au fripon',
Nenion kaptis li avide sen bezon',
Kaj birdojn en gharden' li pelis tute
sperte.*

*Sed al Kampul' malgrandis la profit'.
Pelante birdojn en rapid'
Sur multaj bedoj sen hezit'
Azeno kuris tiom lerte,
Ke tretis li legomojn ghis la fin'.
La terkultur' pereis en ruin'.
Kampulo kun koler' sur dorso de
Azeno
Notskribis per baston' malgajnon en
ghardeno.*

*"Do juste!" lautas kri': "Meritas tion
brut'!
Ja tute, sen diskut',
Li stultas por afero."*

*La stulto de Azen' sendube estas vero.
Lin trafis lau merit' la frapoj de
baston',*

*Sed ankaŭ la Kampuloj tre kulpas en
malbon',
Ĉar dungi al labor' necesas kun
rezoj'.*

PAROHHANO

*Se estas vi por vanta mond' amika,
Alnomos oni vin genio plej unika.
Sed al fremdul' kun eminent',
Kun la inspiro kaj talent',
Rilatas homoj sen honoro,
Ech sen mencio de favoro.
Al tiuj homoj, eble je chagren',
Mi diros veron por kompren'.*

*Jen unu predikisto kun impono
(Li elokventis kvazau mem Platono)
Predikis en preghej' pri la morala
tem'.
Miela estis lia parolem':
La predikist', sincera lau esprimo,
Direktis al chiel' profundon de animo,
Akuze luktis li al vanto kaj frivol'.
Jen finis la preghist' prezenti la
predikon,
Kaj chiuuj restis sub influ', —
Imprese sentis la efikon
Kaj multe larmis dum parola flu'.
El templo iras nun preghantoj:
"Ho, kiom bele montris sin talent'!"
Eldiras unu el pasantoj:
"Kaj kia vervo en la sent'!"*

*Kaj kiel tiras li la korojn al beato!
Sed restas vi, amik', en plej pasiva
stato,
Al vi forestis plor' dum tiu chi predik'.
Chu ne komprenis vi?" — "Komprenis
mi, amik',
Sed mankas por plorad' la kauzo kaj
instig' —
Mi estas parohhan', sed de alia
strato."*

DUKATO

*Chu en klerigh' sin kashas la utilo?
Profiton certan donas ghi.
Sed, lau erar', tre ofte miksas ni
Bonecon de klerigh' kun lukso, brilo,
Ech kun malvirto au similo.
Necesas do pripensi pri afer':
Dum skrapas ni krudajhon de
malkler',
La sentoj sen difekt' disfloru en liber',
Inklinu la spirit' al tutmodesta moro,
Simplecon puran strebu la anim',
Kaj per la falsa bel-esprim'
Ne brilu malhonor' anstataŭ ghusta
gloro.
Pri tiu vero kaj maksimum'
Tre gravan libron povus mi eldoni,
Sed mi ne volas en gravajhoj droni;
La veron en kombin' kun sherco-
ironi'
En rekta fablo simple montros mi.*

*Jen vivis kamparan', rakontas oni.
Hazarde trovis li Dukaton sur la ter',
Malpuran tute, polvan, en mizer'.
La kamparan' enspezon certan
revas, —*

*Por la profit' alvenas jam propon'.
Sed lin obsedas pens': "Duoblon mi
ricevos,
Rimedon scias mi kaj certe levos
Por la Dukat' valoron kun impon'."
Jen por afer' li prenas sablon, kreton
Kaj brikon en pulvor',
Plenumas li laboron tre konkretan:
Dukaton skrapas li per briko,
Kun plena energi'
Per sablo kaj per kret' Dukaton frotas
li,
Ekbrilas la Dukat' pro tiu frot-efiko.
Kaj, vere, kiel flam', ekbriiis la Dukat',
Sed perdis ghi la pezon,
Do ankau sian prezon, —
Kaj venis por proflt' mizera rezultat'.*

KAMPARANO KAJ SERPENTO

*Por havi la estimon en popol'
Amikojn vi elektu sub kontrol'.
Farighis Kamparan' amiko de
Serpento —*

*En tiu best' tre fortas la prudento.
Do ghi influis lerte, kun logik',
Ke estas ghi por amikec' unik'.
Sed la parencoj multaj kaj konatoj
Kampulon fremdas, ne vizitas lin.
"Pro kio vi, amikoj bonaj, frataj,
Forlasis tute min?*

*Chu la edzin' gastigas vin malbone?
Au jam regalo tedis vin persone?"
"Ho, tute ne! Ni shatas vin, amik'.
Neniam vi ofendis lau efik'.
Aflikton ajnan ni ne trovas.
Sed mankas tute la plezur'
Viziti domon kun vipur' —
Ja via proksimul' sinkashe piki
povas."*

STURNO KAJ KATIDO

*Jen vivis Sturno en la dom', —
Kantist' malbona, lau rezon',
Sed filozof perfekte sagha,
Kaj kun Katid' amika estis li.
Aspektis la Katid' sufiche agha,
Sed plena de ghentil', afablo, simpati'.
Jen foje al Katid' okazis tragedi':
Hazarde li tagmanghon ne ricevis.
Enpense vagas li, miauas pro malsat',
Kaj svingas voston Kat'.
Chagrene la Katid' pri mangho multe
revis;
La Sturno-filozof' konsili devis
Kaj diris li: "Naivas vi, amik',
Ke vi toleras faston en praktik';
Jen apud vi en kagh' kardelo
pendas, —
Kaj vi, senpensa, manghon nun
pretendas."
"Sed konscienc'..." — "Ghi estas sur
paper',
Kaj fakte stultas la afer',
Por malsprituloj — antaugh',
fabelo,
Kaj por saghul' — ridinda bagatelo!
Al homo kun la fort'*

Subighas ajna sort'.
Jen argument' kaj jen ekzemplo-vero."
Klarigis li kun plena elokvent', —
Kaj al Katid' ekplachis argument'.
Do kaptis li kaj manghis la kardelon.
Ekghuis la Katid' en mangho alt-
nivelon,
Sed tamen por tagmangh' malgrandis
la kardel'.
Do studis la Katid' kun zorgo kaj
fidel'
La duan kurson, montris li
persiston, —
Kaj diris li al Sturn': "Mi dankas, bon-
amik',
Pro via sagho plena de praktik'!"
La kaghon rompis li kaj manghis
instruiston.

NUBO

*Tra turmentita pro sekigho lando
Trapasis fluge Nub' kun peza grando.
Ech unu gut' ne falis ghis la ter',
Sed pluvis ghi al maro en liber'.
Pro tiu ago Nubo fanfaronas.
"Sed tiu malavar"
Per bono ne imponas",
Rimarkis Monto en deklar'.
"Sentauga estas fanfarono!
Se pluvis vi al kampoj pro kompat',
Vi savus landon de malsat';
Sed akvo por la mar' ne estas granda
dono.*

HERAKLO

*Heraklo, de Alkmena fil'.
Kun kor' kuragha kaj audaca,
Trapasis en montar' kun malfacil'
Lau voj' mallargha kaj minaca.
Jen, vidas li, — sur vojo kushas ajh',
Malgranda io, nekonato.
Li volas treti ghin. Sed je domagh'
Pufighas kaj duoblas ghia stato.
Heraklo kun kolera ton'
Ghin frapas per baston',
Sed en redon'
Pliighas ghi pli multe kun teruro:
Dikighas, kreskas ghi kun shvel',
Plenshirmas sunon en malhel'
Kaj baras vojon kvazau muro.
Heraklo jam bastonon jhetas for,
Konsterne miras en konfuza kor'.
Sed jen Atena venas al dezerto.
"Vi vane penas nun", shi diras kun
averto:
"La monstro nomas sin — Kverel',
Se vi ne tushos ghin, ghi estos sen
kruel',
Sed se atakos kun intenco,
Grandighos ghi plej forte en potenco,
Terure kreskos ghi — ghis alto de*

chiel'."

PRI LA ESPERANTA TRADUKO DE LA KRILOVAJ FABLOJ (Kelkaj rimarkoj de la tradukinto)

Tradukante la fablojn de Krilov mi havis celon respeguli ne nur la poezian enhavon, sed ankaŭ la poeziajn flugurojn de la originalo. Tiucele estis uzitaj:

Diverssilaba libera jamba strukturo (de du ĝis ses piedojh), kun nepra enmeto de cezuroj (internaj paŭzoj). Nur unu fablo estis tradukita per regula trokeo, sen cezuroj, laŭ originala teksto. Nepra uzo de rimoj kaj de cezuroj kun viraj kaj virinaj finajhoj (kun akcenta kaj senakcenta lasta silabo). Konservado de majuskloj en la titolaj vortoj kaj komence de ĉiu verso. Simetria dislokigo de versoj (rilate al marghenoj). Titolaj vortoj kun difina artikolo (laŭ ĝenerale literatura tradicio). *[Sed tiu tradicio estas sensenca! Ni forigis la nenecesajn artikolojn el la titoloj]*

Interpunkciado laŭ la interpunkcia stilo de Krilov. Eventuala apostrofado de substantivoj

kaj parta forlaso de la artikolo la, por konservi la originalan ritmon ("Poezia libereco" laŭ Zamenhofa permeso kaj praktiko). La persona pronomo por bestoj estas ne nur ghi, sed ankaŭ li kaj ŝi (laŭ Zamenhofa praktiko). La tempo de verboj, por plivigligo de la teksto, estas transdonita jen per "as"-formo, jen per "is"-formo. En apartaj okazoj, rektaj komplementoj estas ŝanĝitaj al malrektaj per helpo de prepozicioj, kaj inverse. Tio ne kontraŭas al la spirito kaj esenco de Esperanto. En diversaj lingvoj ja ekzistas diversaj uz-kutimoj rilate al rektaj kaj malrektaj komplementoj, kaj tiu reciproka ŝanĝo plirichigas la lingvon, faras ĝin pli fleksebla kaj esprimriĉa. Kelkloke estas uzitaj, kiel prefiksoj, radikoj, bel, bon, jun, plen k.a. Ekz.: jun-sinjoro, bon-ami-ko, hel-junulo ktp. Tio ne estas kunmetitaj vortoj, sed derivajhoj (same kiel bonvolo, grand-sinjoro, chef-urbo, fru-mateno ktp.). Kelkloke kunmetitaj vortoj havas kvazaŭ kunligon de adjektivoj kun substantivoj, sed fakte tio ne okazas. Estas nur kunligo de du substantivoj. Ekz. amhumoro, printemp-monato, streĉlaboro, minac-malbono ktp. Tio estas: humoro kun amo, monato de printempo, laboro

kun strecho, malbono pro minaco...

La aŭtoro de la fabeloj uzis tre riĉan vortaron kaj multfoje tradiciajn, "popolajn vortojn". Por doni ekvivalentajn esprimojn en la tradukitaj fabeloj, necesis apliki diversajn formojn de la esperanta vortfarado, eluzi la proprecan kreaĵkapablon de Esperanto.

Nekutimaj vortkombinoj estas donitaj kun divid-strekoj. Krom kombinaĵoj de vortoj kelkfoje mi reduktis apartajn vortojn, forigante iujn sufiksojn. Ekz. "sen mezur', sen kalkul' " — anstataŭ "ne-mezu-reble, nekalkuleble" en la metafora senco de "tre multe", «junino» anstataŭ «junulino» ktp.

Certe riu redukto ne malutilis al la bona kompreno de la senco. En la traduko estas vaste aplikita sensufiksa verbigo de neverbaj radikoj. Sufiksoj «ig» kaj «igh» montras la shanghon de stato; la sensufiksa verbigo montras la staton mem. Ekz. «grandas» signifas "estas granda". La sensufiksitan verbigon multfoje uzis Zamenhof. Mi nur larghigis la aplikon de tiu verbigo, — konforme al la nuntempa evolu-tendenco de Esperanto. La lingvo de la Krilovaj fabeloj estas ne nur riĉa, sed ankaŭ belsone komponita. Por

respeguli certagrade la belsonecon de la originalo, estas aplikita sonritma strukturo de versoj. Laŭ tiu strukturo parencaj kaj identaj sonoj (konsonantoj) troviĝas ne nur en la finajhoj de la versoj (en rimoj), sed ankaŭ interne de la versoj, kaj ili harmonie kunligas la tekston je unu poezia tutajho. Parencaj sonoj apartenas al la samaj songrupoj, ekz. «b-p-v-f», "m-n", «n-l-r», "s-c-z", «d-t» ktp.

Parencaj kaj identaj sonoj situas je racia, ne ĉiam egala, distanco. De tie devenas la termino «sonritmo». Parencaj kaj identaj sonoj povas esti apartaj aŭ en formo de kombinajhoj, en rekta aŭ inversa ordo. Ekz.: "portas-frotas-dormas, ridas-tiras, verda-tero".

Kaj jen kelkaj ekzemploj el la tradukoj:

"spegulo sen indulg'...

"inside jam vizitas"

"aplombon plu ne uzi"

"Ursulon karan traktas li karese"

"Sed Shtonon stultan trompis la destin'»

"Tre lerta estis frap', kranio plene krevis"

En poeziaj verkoj la muzika strukturo ludas sufiĉe gravan rolon. Akcenta ritmo kaj rimoj estas artibutoj facile kompreneblaj; la sonritmo

ne estas tiom evidenta, oni pli sentas, ol komprenas ĝin. Parencaj sonoj, je diversa distanco, plifaciligas prononcon kaj audon de la poezia teksto. La sonkombinoj en poeziaj verkoj pli potence efikas al ni per sia organizita strukturo.

La sonritmo ne estas strikie regula, sed aspektas tute Hhera. Ne ekzistas konstantaj leghoj por sonritmo. Elekto de h sonritmo en chiu aparta okazo estas farata laŭ la poezia kaj muzika sento de la tradukanto. Kompreneble, pro la diverseco de lingvoj, la sonritmo de la originalo kaj de la tradukajho ne koincidas laŭ loko kaj formo. Pro la sama kaŭzo ne estas ĝuste atribui al apartaj sonoj iun simbolan signifon. La sonritmo ne estas dogmo aŭ ilo memcela; ĝi estas nur rimedo, kiu apud aliaj poeziaj formoj helpas pli profunde kaj pli emocie percepti poezian verkon. La esperanta traduko de la Krilovaj fabeloj proksimigas la legantojn al unu el la plej gravaj trezoroj de la tutmonda literaturo. Krom tiu ĝenerala celo la tradukinto havas apartan celon — influi al la plua progreso de nia lingva kulturo. Mi intencis per la traduko plenumi praktike la jenajn taskojn:

a) Doni vastan literaturan materialon por instrua kaj kluba laboro, chu al infanoj, chu al plenkreskuloj — en fotmo de legado, parkera ellerno, deklamado, enscenigo ktp.

b) Respeguli en la traduko modernan esperantan stilon. Apliki en la traduko simplan kaj chiutagan lingvon, kaj per tio plifirmigi la bazon de la realisma poezia skolo.

c) Kulturi necesan literaturan guston, kie la sona komponado apud aliaj poeziaj rimedoj faras la veran poezian impreson. La versaj stumbloj, sen muzika arangho, kompromitas Esperanton ("ghi estas kvazau ligno!"), kaj ankaŭ kompromitas la grandajn poetojn, kiujn oni tradukas. Rezulte estigas erara opinio, ke Espranto ne povas ludi la rolon de literatura perilo, kaj ke ghi ne taugas por poezio.

ch) Doni tradukojn sen formala kopiado de la originala teksto. Tre ghusta kaj lauvorta traduko malulitas al la kvalito de la versoj, al uia muzika, lausona arangho. Oni devas ne sklave kopii la originalon, sed transdoni ghin lausence: konservi ne la vortojn, sed la poezian spiriton de la verko. Al pensoj, poeziaj figuroj, stilo, versa ritmo kaj muziko de sonoj en la originalo, la

traduko devas doni laueble plenvaloran ekvivalenton, kiu elvokas che la legantoj la saman impreson, kiel la originalo.

Fine staru chi tie fragmento el la letero I.V. Sergejev (1903–1964), esperantisto kaj konata rusa spciatisto pri Krilov:

"Tamen por vi estas malfacile imagi, kian veran ghuon, se ne diri pli multon, prezentis al mi viaj tradukoj. Sincere mi gratulas vin, kaj mi ghojas, ke Krilov trafis en ghustajn manojn. Precipe admirinde allogas en viaj tradukoj intonacia precizo, kaj tion estas neimageble malfacile konservi en tradukoj de Krilovaj fabloj al aliaj lingvoj. Mi ne deziras ech fari komparon kun franclingvaj tradukoj, tute fremdaj al Krilov, au kun la germanaj, multepezaj en sia lingvo... Se Krilov farighos atingebla al alilanda leganto, do tio okazos nur dank' al viaj tradukoj! Kaj tio estas rimarkinda afero! La' Krilova spirito, la Krilova seriozeco — ironia kaj didaktika — chio tutplene estas konservita... Moskvo, 1961-07-08."

S. RUBLOV